

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

TRIUMFO POR
TITANOJ

•

LA VIVO TION
POSTULAS
DE NI!

•

ORIGINALA
VERKARO

•

NIA INTERVJUO

•

JARA PLANO
DE BEA

•

VERDAJ
STELETOJ

•

KIAM, KIE, KION



TRIUMFO POR TITANOJ

140 jaroj de la naskiĝo de Hristo Botev



Eĉ se ne estis okazinta la konatiĝo de Botev kaj Levski en la vintro de 1868, en iu el la randkvartaloj de Bukureŝto, eĉ se ne estis okazintaj iliaj interparoloj — jen flamaj, jen pli rezonemaj, eĉ se ili ne estis dividintaj malsaton kaj kantojn, en nia konscio ili estus same tiel intime ligitaj. Ni turnu nin al la mirinda kronikisto de niaj popolaj bataloj por libero Zahari Stojanov, al lia modesta „provo pri biografio“ de Hristo Botev: „La estontaj liaj biografiistoj. . . surbaze eĉ de nur unu lia versaĵo povos karakterizi kaj lin, kaj la epokon, en kiu li vivis“. Aŭ: „Kion ajn li skribis, kion ajn li diris, lia animo entute partoprenis en liaj paroloj, en lia ploro, en lia rido“.

Botev verkis malmultajn versaĵojn. Ĉiuj ili tamen transvivis ne nur la jarcenton pasintan post lia morto, ili ĉiam estos signo de plena kunfandiĝo de eksterordinara talento kun eksterordinara sindonemo por la popola faro.

Unu el tiuj eternaj versaĵoj estas „La pendumo de Levski“. Malmultaj poetoj post li kuraĝis versi pri la senkonsola doloro de la patri-no-patrolando por ŝia pereinta filo.

La historio decidis, ke nia popolo posedu ankaŭ rektajn atestojn pri la spirita parenceco de ambaŭ titanoj de nia nacia revolucio. Pri ilia kunvivado en Rumanio denove plej detale informas Zahari Stojanov. En lia rakonto ĉeestas ankaŭ la konsiloj de la „pli sperta, kun pli firma bulgara naturo“ Levski al la impresigema poeto: „Vi estas homoj kleraj, agu tiel, ke vin estimu ĉiuj ceteraj niaj fratoj. Instruu al ili per plumo kaj paroloj kio estas libero, patrujo, homeco, honesteco, persisto kaj reciproka amo“.

Kaj la letero de Botev al Kiro Tuleŝkov el Brailo pri lia kunvivado kun Levski en la forlasita muelejo, estas plej pura fonto pri la efiko de „unu neimagebla karaktero“ sur „iun flaman naturon“. Certe ĉiu el ni memoras tiun rakonton pri malvarmo, malsato kaj pri la kantoj de la Karlovano — vespere kaj matene, pri lia kapablo „en kiom ajn plorinda stato vi troviĝus, gajigi vin kaj igi vin forgesi ĉagrenojn kaj suferojn“. „Aĝrable estas vivi kun similaj nomoj“ — konkludas Botev. Li, kiu ne konas obeemon, kiu povas toleri nenies aŭtoritaton.

Zahari Stojanov difinas la gravecon de la konatiĝo de la du revoluciuloj en unu lakona frazo: „Levski estas morala triumfo por Botev“. Kion ni povas aldoni? Nur tion, ke ilia reciproka amo estas morala triumfo ankaŭ por ni, la posteuloj de tiuj du gigantoj de nia batalo por nacia libero. Kaj ni kun ĝojo notas tion hodiaŭ, kiam finiĝas 140 jaroj de post la naskiĝo de Hristo Botev, duonjaron post la celebroy lige kun la 150-jara datreveno de la naskiĝo de Levski. Kaj pri tiu fakto ni atentigos ĉiam. Ne komparante ilin, ĉar simila provo estus absurda! Ĉar la titanoj estas nekompareblaj!

Ljuba MAGAROVA



La vivo tion postulas de ni!

Sava DÄLBOKOV,
prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio

La proceson de renovigo kaj renkonstruado en nia lando frontas ankaŭ la Asocio de Bulgaraj Esperantistoj. Ĝi ne postrestas de tiu potenca impeto de la bulgara popolo al kreo de novaj socialaj kaj administraj strukturoj, al definitiva plibonigo de la organizo kaj funkciado en ĉiuj sferoj de nia socialisma socio, konforme al la atingoj kaj postuloj de la scienc-teknika revolucio mondscale.

La Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio zorgeme reviziis kaj pritaksis la agadon kaj la staton de nia movado dum la lastaj jaroj. Estis konstatite, ke BEA hodiaŭ estas nedisigebla parto de la soci-kultura strukturo en nia lando, ke ĝi estas unu el la plej aktivaj socialaj organizaĵoj, kolektiva membro de la Partrolanda Fronto. Dum sia multjara ekzistado kaj agado Bulgara Esperantista Asocio akiris grandan organizan, kulturen kaj propagandan sperton, partoprenis en gravaj naciaj kaj internaciaj kulturaj aranĝoj, kongresoj, demonstracioj defende al demokratiaj rajtoj kaj al la monda paco.

Tamen ĉiam ankoraŭ ne estas utiligataj ĉiuj eblecoj de BEA por pli efika informado kaj propagando eksterlande de la atingoj kaj sukcesoj de la reala socialismo en Bulgario; por establo de pli regulaj kaj viglaj kontaktoj kun esperantistaj organizaĵoj kaj apartaj esperantistoj el la evoluintaj landoj; por kunlaborado kun progresemaj antiimperialismaj movadoj; por pli aktiva defendo de la monda paco.

La lingva kono kaj la uzado de Esperanto far la plejparto de la asociaj membroj en ilia en-

landa kaj eksterlanda agado ne estas kontentiga. Ĉiam ankoraŭ la kunordigo inter apartaj fakoj de la asocio, samkiel ĝiaj interrilatoj kun aliaj soci-politikaj organizaĵoj en nia lando ne atingis la deziratan nivelon.

En la agado de la organizaĵo nesufiĉe estas aplikataj la principoj de plej bona kunfandiĝo de socialaj kun personaj interesoj, stimulado de kreaĵ iniciatoj kaj de modela organizado de la laboro de apartaj aktivuloj kaj fakoj en la asocia strukturo. Ĉiam ankoraŭ oni povas konstati manifestiĝojn de individuismo, manko de disciplino, de malbonaj interrilatoj, kiuj tute ne estas konformaj al la socialisma kaj esperantista moralo kaj principoj.

En la proceso de renovigo ĉio ĉi devas esti forigita. Necese estas, ke BEA efektive radikanan rekonstruon de sia agado, mobilizu la fortojn de ĉiuj bulgaraj esperantistoj por plialtigo de ilia lingva kaj politika kvalifikado, por ilia aktiva partopreno en realigo de la strategia kurso de la partio por esencaj ŝanĝoj en ĉiuj sferoj de nia socio vivo!

Konforme al la novaj administraj kaj soci-politikaj strukturoj en nia lando la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio preparis ampleksan programon por ĉiuflanka plibonigo de la bulgara esperantista movado ekde 1988 jaro.

Nia plej grava tasko nun estas plibonigo de la metodoj kaj organizo de instruado de Esperanto kaj plialtigo de la nivelo de idea-eduka laboro kon-

forme al la postuloj kaj decidoj de la XIII Kongreso de la Partio. Plej grava tasko de ĉiu esperantisto estas diskonigi kiel eble pli aktive kaj pli rezultodone Esperanton en diversaj medioj kaj soci-tavoloj. Tiurilate necesas plibonigo de la presdonoj de BEA — laŭ enhavo kaj poligrafia arango. Nepras pli granda kaj efika celkonformeco de la organizataj en nia lando esperantaj kulturaj aranĝoj (festivaloj, recitaloj, revuoj, ktp) kun helpo de profesiaj spertuloj.

Unu el la plej gravaj organizaj taskoj de BEA estas plifortigo de la rolo kaj la aŭtonomio de la apartaj esperantistaj societoj, kiuj estiĝu kerno de la tuta aktivado, centro de loka agado. La estraroj de la societoj devas serĉi kaj apliki novajn formojn kaj iniciatojn por pliriĉigo de la agado de siaj membroj, varbi novajn esperantistojn kaj fari ilin konvinkitaj adeptoj de la humana ŝaro de Esperanto.

Ne mapli pli grava tasko estas la pristudado kaj enkonduko en nian agadon de la sperto de esperantistaj organizaĵoj el la aliaj socialismaj landoj. Tiucele oni plivigligu la aktivadon de apartaj esperantistaj sekcioj, kluboj laŭ interese k.a.

En plej proksima estonto BEA devas transformiĝi en kunordiganton de la tuteca agado de

la bulgaraj esperantistoj enlande kaj de ilia internacia aktivado. En la spirito de la novaj postuloj de la nuntempa vivo en nia lando estas necese, ke CE de BEA kreu tute novtipajn helporganojn (komisionoj, kluboj, k. a.), kiuj kontribuu al plibonigo de la agado de la tuta asocio. Tiamaniere plifirmigos la sociaj principoj en la laboro de la gvidorganoj de BEA, la demokratiko kaj la kompetenteco. Necesas nepre plialtigi la nivelon de instruado de Esperanto, de la idea-eduka agado, de la organiza laboro kaj de la internaciaj rilatoj.

La novaj strukturoj de nia Asocio helpas ties rekonstruadon, kiu respondas al la taskoj starigitaj antaŭ BEA de la plej altaj ŝtataj organoj kaj plifortigos la sociajn principojn en ĝia agado. Tio ebligas ankaŭ celkonforman reduktion de la administra strukturo de la Asocio. La ŝparitajn monrimedojn oni uzos por plua disvastigo de Esperanto en nia lando, por plua disvastigo de la movado.

La rekonstruado de Bulgara Esperantista Asocio aktivigos ĉiujn membrojn kaj fakojn de tiu specifa socia organizaĵo, kies agado estas prilumita de la ideoj de monda paco, progreso kaj amikeco inter la popoloj.

UNUA NACIA KONFERENCO PRI E-INSTRUADO

La 22-an de novembro 1987 en Sofio okazis Unua Nacia Konferenco pri Problemoj de la Esperanto-Instruado. Ĉeestis pli ol 200 E-instruantoj kaj esperantistoj el tuta Bulgario. Gastis la prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio — Sava Dălbokov, la honora prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) — Nikola Aleksiev, la vicprezidanto de BEA inĝ. Petăr Todorov kaj ĝia ĝenerala sekretario Dimităr Papazov, la ĉefdirektoro de IEK — inĝ. Angel Todorov.

Per mallonga parolado la konferenco malfermis la prezidanto de la Instru-komisiono ĉe BEA — Violin Oljanov. Li anoncis la tagordon kaj proklamis Esperanton laborlingvo de la konferenco. Raporton pri la instru-agado, atingoj, problemoj, antaŭstarantaj taskoj, tralegis la sekretario-metodikisto ĉe fako pri Instru-agado kaj Kvalifikado de BEA Nedka Valjaviĉarska. Sekvis trihora vigla diskutado. Parolis veteranoj-lektoroj de Esperanto kaj tute novaj E-instruantoj. Ili dividis pensojn kaj sperton,

konfesis la malfacilaĵojn kaj obstaklojn, kiuj malhelpas ilian laboron, rakontis pri siaj sukcesoj. En la eldiroj de preskaŭ ĉiuj 22 parolintoj ĉeftemo estis plibonigo de la E-instruado. Denove estis substrekit, ke ĉiam ankoraŭ mankas bonaj lernolibroj. Oni ne ĉiam elektas la plej konvenajn personojn por gvidantoj de naciaj kaj internaciaj E-kursoj. Mankas instruhelpiloj kaj belarta literaturo — precipe la libroj de la E-klasikuloj. Denove oni starigis la problemon pri E-kursoj en la radio kaj televido — problemo multfoje diskutata dum kunsidoj de CE de BEA, sed ĉiam sen fina pozitiva rezulto. Estas jam tempo ne plu uzi la bone nin protektantan frazon: „Tiel estis ĝis nun. . .“ kaj komenci apliki ĉiujn modernajn rimedojn por altiri junajn homojn al nia movado. Pere de la internacia lingvo Esperanto ni devas penetri ĉiujn socitavolojn, kontakti laŭeble plej multajn ho-

mojn, amikiĝi kun ili kaj vicigi ilin en la „rondo de la Esperantoj“.

„La konferenco havos efikon kaj estos tre utila por la estonta laboro — diris en sia konkluda parolado Nedka Valjaviĉarska, — ĉar la proponoj pliriĉigos la preparatan longdaŭran programon por instrulaboro.“

Fine la partoprenantojn salutis la prezidanto de BEA Sava Dălbokov kaj koncize informis ilin pri la antaŭstarantaj ŝanĝoj en la strukturo de la Asocio.

La Unua Nacia Konferenco pri Problemoj de la Esperanto-Instruado pasis tre sukcese kaj rezultodone. Ni esperu, ke la faritaj proponoj estos efektivigitaj kaj la lingva nivelo de la bulgaraj esperantistoj plialtiĝos dank' al la senlaca kaj sindona laboro de la E-instruantoj!

Veneta BALEVA

DIFERENCIGO DE LA SEKSOJ EN ESPERANTO

Kiel sciante la iniciatinto de Esperanto purigante la lingvon de ĉia nenecesa balasto evitis la gramatikajn genrojn de la nomoj, kiuj ege malfaciligas la lernadon kaj la uzon. Tamen por diferencigo de la seksoj de la vivaj estaĵoj li kreis specialajn lingverojn. Tio estas: la sufikso **-in-**, la prefikso **ge-** kaj la personaj pronomoj de singulara tria persono — li kaj ŝi.

Cu en la lingva praktiko ni estas devigataj ĉiam uzi tiujn seksodiferencigajn elementojn?

Se en kurso de komencantoj kursanino dirus „mi estas oficisto“, la kursgvidanto rimarkigas: „Ĉu vi estas viro?“ Kaj li igas ŝin diri korekte „oficistino“. Tio estas regula konduto de la Esperanto-instruisto, ĉar la sufiksoj prezentas novan materialon por la lernantoj kaj ili devas kutimiĝi uzi ilin. Ja ili ofte preterlasas la sufikson **-in-** ne pro iaj teoriaj konsideroj, sed ĉar simple ili forgesas, ne havante kutimon.

Kiel statas la afero en la lingvo-praktikado de bonaj uzantoj de la lingvo?

Kiam ni informas, ke lupoj atakis ŝafejon, ni neniam uzas la formojn „lupoj kaj lupinoj“ aŭ „gelupoj“, ĉar ni ne nur ne scias la sekson, sed ĝi absolute ne interesas nin. Por ni estas egale damaĝe ĉu lupo aŭ lupino mortigis la ŝafojn. La samo validas pri urso, leporo, elefanto ktp. Eble en la zoologia parko estas unu elefanto, kaj eĉ se ĝi estus femalo (de ina sekso), ni diras: „Ni vidis la elefanton“ (same: la urson, la tigron ktp). En ĉiuj ĉi okazoj la sekso ne interesas nin.

Tamen se mi havas hejme masklan (virseksan) leporon, mi diras al la infanoj: „Mi iros al la bazaro por aĉeti leporinon, por ke ŝi nasku al ni leporidojn“. En tiu ĉi okazo la sekso gravas, ĉar ni per la ineksa leporo deziras plimultiĝi nian leporan bieron bredante leporidojn. Ni diras „kokinoj“, ĉar ili donas al ni ovojn, kaj la kokoj tion ne faras, ni parolas pri „bovinoj“, se temas pri lakto-produktado. Do, ni vidas, ke la sufikso **-in-** emfazas la sekson, kiam ni bezonas tion.

Tiu ĝenerala principo validas ankaŭ kiam ni parolas pri homoj. La diferenco estas nur kvanta. Ĉe la homoj ni pli ofte utiligas la seksodiferencigajn afiksojn, ĉar la seksoj de la homoj ludas pli grandan rolon en la ĉiutaga vivo. Tamen ankaŭ en tiu sfero ni rajtas ne uzi ilin, se en la konkreta kazo la sekso ne gravas, aŭ estas aliaj signoj pri la sekso. Ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj (same en la bulgara) oni diras: s-ino V. — ministro de la eksterlandaj aferoj, Indira Gandhi — ministro-prezidanto de Hindio, s-ino Akino Korason — prezidento de Filipinoj ktp. En tiuj okazoj ni ne uzas la sufikson **-in-** ne nur ĉar antaŭ la nomo plej ofte staras la titolo „s-ino“, sed ĉar ne la sekso gravas, sed la ofico. Ofte ankaŭ en la Jarlibro de UEA oni skribas: s-ino N.R. — sekretario,

f-ino B.M. — instruisto, s-ino T. M. — agronomo ktp.

Ĉiuj supraj ekzemploj montras, ke per la speciaj nomoj (urso, lupo, tigro, leporo), per la bazaj nomoj de profesioj (advokato, teĥnikisto, agronomo. . .), de kvalifiko (amiko, vegetarano, samideano. . .) ni signas beston aŭ homon ne nur de vira sekso, sed tre ofte — sen konsidero de la sekso (oni povas kompreni ambaŭ seksojn). En tiuj okazoj kun plena forto validas la principo de neceso kaj sufiĉo.

La samo gravas ankaŭ pri la prefikso **ge-**. Se ni dirus — „La laboristoj en tiu lando estas mizere pagataj“ — ĉu iu komprenus, ke tio rilatas nur la virojn? Certe ne! Aŭ — „La ministroj decidis. . .“ Ĉu tio signifus, ke sen la ministrinoj? Mi ne kredas, ke iu ajn tiel primitive komprenus.

Ordinare en kunvenoj mi alparolas per: „samideanoj“, „amikoj“, „kolegoj“, kvankam en la kunveno estas pli da virinoj. Neniu pensas, ke mi ignoras ilin. Mi sendas libron al korespondantino kun dediĉo: „Al mia Esperanto-amiko Karmen“. Per tio mi emfazas la estimon al ŝi, kiel honesta homo, idea esperantisto, bona korespondanto, senkonsidere al ŝia sekso.

Interesa estas la demando pri la uzo de la personaj pronomoj. Sekso-diferencigajn pronomojn Zamenhof kreis nur en tria persono singulara. Feliĉe, en pluralo la pronomo estas

komuna. Ĉu tio malfaciligas nin? Dirante „ili“ ni ne montras ĉu ni parolas pri viroj, virinoj, infanoj aŭ bestoj. Sed ja antaŭ tio ni parolis jam kaj klarigis kiuj estas „ili“. La samo laŭ mi, validas pri singularo, sed la iniciatinto de la lingvo kreis diversajn pronomojn kaj ni devas uzi ilin. Tamen ekzistas okazoj, kiuj embarasas nin. Ni povas paroli pri homo ĝenerale, senkonsidere al la sekso. En tia okazo la virseksa „li“, simile al la nomoj de la bestoj, la profesioj, la kvalifikoj k. a., havas ĝeneralan signifon pri ambaŭ seksoj, kiel reprezentanto de la specio.

Ekzemploj: Ĉiu homo estas esperantisto, se li uzas Esperanton, eĉ se li ne partoprenas en la organizita E-movado. Ĉiu membro de la societo devas pagi membrokotizon, se ne, li estos forigita. Se iu ne obeas la regularon, li estos punita.

Evidente en ĉiuj ĉi ekzemploj ne temas nur pri viroj. Sed troaj feministoj vidas en tiu uzo diskriminacion rilate al la virinoj. Tio kompreneble ne estas serioza starpunkto. En la lingvo ĉio estas konvencia kaj tia konkludo ne estas logika. Ili proponas enkondukon de li/ŝi, ŝi/li, liŝi, ŝili. La lingvouzo tamen ne akceptas tiujn pezajn formojn. En pluralo ja estas nur unu formo kaj neniu protestas. En unua kaj dua personoj ankaŭ estas nuraj formoj. Se vi aŭdus — „Ni kuŝis sur la planko“ — ĉu vi komprenus ĉu temas pri viroj, pri virinoj aŭ pri geviroj. Kompreneble ne, tamen la kunteksto helpas. La ekstrema precizeco kaj logiko en la lingvo ne estas ebla kaj ne estas utila.

Konkludo: Kiam kursanino en tria grado respondas: „Mi laboras kiel kontisto“ — mi ne korektas ŝin, ĉar mi vidas, ke ŝi estas ino kaj mi interesiĝas nur pri la profesio.

Violin OLJANOV



Originala verkaro

Festo! Granda festo! Festas la tuta Tero! Festas la homoj en la tuta mondo! Oni festas la Duan Jarmilon!

La aero, etero, la tuta spaco estas plena de ĝojo, de kantoj!

Radiogramoj traflugas la mondon. La homoj reciprokas bondezirojn okaze de la Nova Dua Jarmilo. Per televido, radio, telegramoj, telefonoj, telegrafoj homoj el la tuta terglobo kun blanka, nigra, flava kaj ruĝa haŭto gratulas unu la alian en la tutmonde akceptita internacia lingvo — en Esperanto!

La okuloj brilas, la vizaĝoj radias, la lipoj ridetas, la koroj estas plenaj de feliĉo.

Sur la malluma firmamento brilas perloj — la foraj malvarmaj steloj, kaj tie ĉi, en la ĝardenoj, sur balkonoj, ĉe malfermitaj fenestroj, ĉie — bonodoras abunde floroj! La atomo transformis la vintron en printempon, varmigas domojn, urbojn, vilaĝojn!

Mi deĵoras en la poŝtoŝticejo. Kaj deĵori en tiu rimarkinda nokto estas vera feliĉo! Mi akceptas laŭ la kosmaj ondoj salutojn de Marso, de la Luno, de Venuso kaj respondas samajn al la Kosmo. En Esperanto!

LA DUA MILJARO

Mia koro vibras unisone kun la koroj de miliardoj da loĝantoj de nia planedo. Jen, ili starigas. La okuloj radias pro feliĉo. La granda momento ekbrilis per blindiga lumo! La Dua Jarmilo!

Oni levas kalikojn plenajn de nektaro, de feliĉo kaj ĝojo. Oni tostas bondezirojn pri ĉiama feliĉo!

Artfajraĵoj, garboj de buntaj kantantaj koloroj ŝutiĝas el la ĉielo!

Sur kolosa televida ekrano malsupren etendita de la steloj ĝis la Tero lumantaj literoj anoncas: — Pacon! Pacon inter la popoloj de la tuta terglobo!

Reprezentantoj de ĉiuj popoloj frate salutas la homojn sur la tuta terglobo kaj bondeziras, ke la Nova Jaro estu plena de ĝojo, paco, prospero!

Sur la grandega ekrano kantas ĥoroj, kantas homoj de ĉiuj nacioj — en Esperanto, en la lingvo de la paco. La koroj ĝojegas! La animoj jubilas!

Mi malfermas la okulojn. Ĉu ĝi estas sonĝo, aŭ revo, aŭ realo?

Ĉu eblas, ke ĝi estas realaĵo? Kaj kial do ne?

Nevena NEDELČEVA

PACO, POLITIKUMADO KAJ LOJALECO

Estimataj legantoj,

Kiel vi jam legis en n-ro 12/1987 de „BE“, aŭtune de 1987 en Bulgario okazis la unua TEJO/BEJ-seminario. Dum tiu internacia arango, krom la interesaj prelegoj, okazis ankaŭ vigla interŝanĝo de opinioj pri gravaj demandoj, inter kiuj: paco, reciproka estimo inter esperantistoj kun malsamaj mondkonceptoj; reflektado de la soci-politikaj kondiĉoj sur nian movadon; signifo de TEJO-neŭtraleco ktp. Reprezentantino de la redakcio intervjuis tri el la partoprenantoj en la seminario nome: Jan Kozsmaluk — prezidanto de TEJO, Andy Künzli — redaktoro de „TEJO-tutmonde“ kaj Valentin Seguru — vicprezidanto de la Junulara Komisiono ĉe la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj.

Nature, pri la esenco de la paco mem, pri la formoj kaj metodoj de pacbatalo, (ĉar ankaŭ la pacbatalo havas strikte politikan karakteron) pri la tikla temo „neŭtraleco kaj politikumado“ povas esti kaj fakte ekzistas malsamaj opinioj. Tio estas tute natura fenomeno, ĝi devas timigi neniu. Ĉar la temo pri paco kaj ĝia realigo en globa skalo estas ege komplika, ĉiuj diverstendencaj esperantistoj devas partopreni tute liberan kaj demokratian diskutadon, sen pretendo pri la unusola vero. En simila atmosfero per komunaj fortoj naskiĝas la vero.

„BE“

Kion signifas por vi paco?

Jan Kozsmaluk:

— Estas malfacila demando. Por mi persone paco signifas vivon. Mi deziras aldoni, ke paco ne estas nur forigo de milito, sed antaŭ ĉio — stato de natura homa libereco.

Andy Künzli:

— En Esperantujo tre ofte renkontiĝas malhomogenaj homoj — de diversaj etnoj kaj sociaj tavoloj. Dum en la lingva fako ne okazas konfliktoj, ili tamen estas sur la kultura kaj socia kampo. La apartaj konceptoj pri konduto, ĝentileco, politiko, religio ktp. povas kaŭzi en internacia situacio miskomprenojn, reciprokajn malakceptojn. Esperanto povas helpi tiajn malfavorajn momentojn. Solvo estas garantii reciprokan toleremon ĉiudirekte. Tio laŭ mi estas la konkreta vojo al pli paca konduto inter la homoj kaj Esperanto estas reala rimedo por krei pli objektivan neŭtralan, paceman situacion.

Valentin Seguru:

— Paco signifas ne nur foreston de milito, sed ankaŭ foreston de streĉiĝo kaj reciproka suspektado. Paco estas reciproka estimo de egalrajtaj nacioj kaj kunlaboro inter ili pri komune interesaj problemoj.

Kiamaniere laŭ vi Esperanto povas kontribui al monda paco kaj interpopola kompreniĝo?

Jan Kozsmaluk:

— Laŭ mi nia movado ne nur povas, sed simple faras tion. Kaj ĉu efektiva realigado de rajto de komunikado inter ordinarnaj homoj, kiuj pere de Esperanto interŝanĝas ideojn, lernas diskuti kaj forigi plurjardekajn antaŭjuĝojn, ne estas foje pli packonstruiva ol bufonaj deklaroj de iuj pseŭdopacaj movadoj aŭ stagnaj plurjaraj interŝtataj traktadoj pri malarmado.

Andy Künzli:

— Propagandante tiun koncepton, kiun mi provis skizi pli supre. Tute certe granda parto de la juna generacio havos pli fortan komprenemon por tiuj ideoj propagandataj jam de Zamenhof, Hodler, Privat ka. Ni, junaj esperantistoj, devas daŭrigi tiun penstradicion.

Valentin Seguru:

— Esperanto estas lingvo esence demokratia pro siaj eblecoj esti facile uzata de ĉiuj, kiuj deziras tion. Ĝi reale servas por senperaj kontaktoj inter ordinarnaj civitanoj el diversaj landoj, por interŝanĝo de informo kaj vivsperto inter ili.

— Kiel vi komprenas la neŭtralecon de TEJO?

Jan Kozsmaluk:

— Ekzakte kiel ĝin difinas nia TEJO-regularo, en la artikolo 5 de la Statuto. Paragrafo 1 de artikolo 5 diras, ke „TEJO estas neŭtrala rilate naciecon, rason, sekson, religion, politikon kaj sociajn problemojn kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj.“ La paragrafo 2 de la sama artikolo klarigas: „La neŭ-

traleco de TEJO signifas, ke TEJO ne prenas starpunkton pri aferoj disigitaj de la lingva problemo en internaciaj rilatoj“. Mi esperas, ke tio estas klara.

Andy Künzli:

— Neŭtraleco de TEJO signifas por mi unuflanke defendi ĝiajn ideologiajn konceptojn pri interna ideo, sendependeco de parti-politikaj teorioj kaj aliflanke — serĉi la kunlaboron kun neesperantistaj ĉu registaraj, ĉu neregistaraj organizaĵoj, kiuj komprenas kaj sincere apogas la pacintencojn de Esperanto.

Valentin Seguru:

— Mi ŝatus citi ĉi-rilate la vicprezidanton de UEA sinjoron Yoshimi Umeda, kiu dum la Internacia Porpaca Esperantista Konferenco en Volgogrado (Sovetunio, aprilo 1986) prelegis pri la bezono sekvi pozitivan neŭtralecon. Rilate, bonon kaj malbonon oni ne estu neŭtralaj spektantoj, sed oni helpu la bonon. Ĉar temas pri paco, oni certe traktu ĝin pozitive, aktive apogu ĝin.

— Laŭ vi ĉu en E-medioj estas utile politikumi aŭ silenti pri tiklaj nuntempaj problemoj?

Jan Kozsmaluk:

— Jes aŭ ne, oni ja tion faras. Mi ne scias, kion vi ekzakte komprenas sub „politikumi“ kaj „tiklaj nuntempaj problemoj“, sed kion ajn sub tio komprenas individuo, en nia movado tiaj diskutoj okazadas laŭ diversaj difinoj de „tikleco“ kaj tion mi trovas tre bona. Mi esperas, ke en via demando ne kaŝiĝas ideo egaligi silenton kun neŭtraleco. Ne preni starpunkton, neniel signifas silenti. Tiu lasta frazo rilatas al TEJO, sed la cetera movado, kompreneble ekster UEA, ĉefe tute ne estas soci-neŭtrala kaj montras ĉielarkon de preskaŭ ĉiuj politikaj koloroj.

Andy Künzli:

— Alvenis la tempo rompi diversajn tabuojn en la socia kaj politika vivo de la homoj loĝantaj la unuopajn landojn. Por solvi la problemojn, unue oni devas koni ilin, t. e. libere diskuti pri ili, konsideri diversajn, eĉ kontraŭstarajn vidpunktojn. Unu sola vero ne ekzistas (eble tamen), devas okazi daŭra interrilato, konsultado kaj konsiderado de novaj ideoj, fleksigemo reala, objektiva polemikado. Do, en tiu senco okazu la politikumado ankaŭ en TEJO. Estas danĝere silenti pri malĝuste evoluanta mekanismo.

Valentin Seguru:

— Oni tute ne timu politikumi. Ĉar kiel oni asertas, Esperanto kiel lingvo kaj movado troviĝas en la kerno de la nuntempaj politikaj problemoj, kiujn frontas la mondo. Temas pri problemoj de informo kaj lingva imperiismo, kiuj estas siavice forte ligitaj kun ekonomia dependeco, analfabeteco, malpurigo de la natura medio ktp. Se oni timas pridiskuti ĉi-temojn kaj partopreni ilian solvon, do oni konscie kondamnas la internacian Esperanto-movadon al povra ekzistado.

Intervjuis: Maria JANKOVA

MIA FRATO TRIFON...

Dum sia restado en Bulgario la pola esperantisto Czesław Biedulski tralegis la libron „Mia vivo“ de Trifon Ĥristovski, kiu treege impresis lin. En Sofio li renkontiĝis kun la frato de Trifon, kolonelo Dimitar Ĥristovski, kun kiu li havis interesan interparolon, kiun ni publikigas ĉi-sube kun mallongigoj.

— Bonvolu diri kelkajn vortojn pri Vi mem.

— Mi naskiĝis la 16-an de marto 1928 en malriĉa kamparana familio, en vilaĝo Radotina, apud urbo Orĥanie (nun Botevgrad). Mi estas la plej juna el sep gefratoj: kvar knabinoj kaj tri knaboj. Restis vivaj nur mia fratino kaj mi.

Trifon estis la plej aĝa inter ni. Kiam li forpasis, mi estis 16-jara. Jam kiel 15-jara lernanto, sub la influo de mia frato Trifon mi aliĝis al la Laborista Junulara Asocio. Oni arestis kaj ekzigis min el la gimnazio de urbo Botevgrad. Mi revenis al mia vilaĝo kaj ĝis la Naŭa de Septembro 1944 okupigis pri kampara laboro. Poste mi daŭrigis lerni en la gimnazio, kiun mi finis en 1946. Kvar jarojn mi militservis. Depost 1955 mi oficas en la sistemo de la Ministerio de Internaj Aferoj.

— Kion plej interesan, plej signifoplenan el la vivo kaj agado de via frato Trifon Vi memoras kaj ŝatus

mencii? Mi volus scii pri iuj specifaj trajtoj de lia karaktero, kiuj distingis lin de liaj samaĝuloj.

— Mia amata pli aĝa frato Trifon stoike elportis sian grandan malfeliĉon. Li rakontis, ke la plej supera senco de lia vivo estas la batalo por liberigo de la proletaro kaj ĉiuj laborantaj homoj.

Trifon estis homo ekskluzive laborema, malgraŭ lia malfeliĉo. Li tre amis la honestajn laborhomojn, kiuj estis fakte lia medio, kion li emfazas en sia biografia libro „Mia Vivo“.

— Kian rolon li ludis en via vivo?

— Li instruis min kaj hardigis mian karakteron, testamentis al mi batali por realigo en la vivo de liaj idealoj. Li postulis de mi esti ĉiam sincera kaj honesta en miaj interrilatoj kun la homoj.

— Kiel kaj kiom li influis siajn samaĝulojn? Ĉu restis ĝis hodiaŭ iu spuro de lia vivo kaj agado en Radotina kaj en la apudaj vilaĝoj?

— Li forte influis siajn samvilaĝanojn, precipe la junulojn. Sed eĉ pli aĝaj ol li vilaĝanoj respektis lin. Oni daŭre memoras lin tiel en lia hejma vilaĝo, kiel en la najbaraj vilaĝoj. Lian domon vizitas multaj personoj el la lando kaj el eksterlando — esperantistoj kaj neesperantistoj. La Esperanto-societo en urbo Botevgrad portas lian nomon. Krome li estas patrono de la Esperanto-societo en Pomorie. Multaj junpioniraj taĉmentoj, junkomunistaj societoj kaj laborbrigadoj en entreprenoj portas lian nomon. Gazeto „Botevgradski plamāk“ (Botevgrad Flamo) ofte publikigas materialojn pri li. Antaŭ nelonge ĝi publikigis foton, kiu

Sub hispana ĉielo

La rilatoj inter hispanaj kaj bulgaraj esperantistoj bone disvolviĝas. Laŭ oficiala invito de Madrida Esperanto-Liceo, dum septembro pasintjare Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, kaj d-rino Verunka Danĉeva — membro de medicinista E-societo „D-ro Zamenhof“ en Pleven, vizitis Hispanion.

Antaŭ esperantista publiko en diversaj urboj D. Ĥitrov prelegis pri la 1300-jara historio de la bulgara ŝtato, pri la bulgara esperantista movado kaj pri atingoj de la laboruloj en socialisma Bulgario.

Ĉi-sube ni publikigas vojaĝimpresojn de DONĈO ĤITROV.

SURVOJE AL MADRIDO

En la unuaj tagoj de septembro, frumatene, ni transiris la francan-hispanan landlimon ĉe Cerbere kaj Port Bou kaj per la luksa ekspresvagonaro „Talgo“ direktiĝis tra Barcelono al Madrido.


La vagonaro kvazaŭ flugus, senbrue glitkurante sur la reloj...

Hispana tero!... Seka, ŝtonplena, dezerta. Nek unu arbo ĝis la horizonto! Nur tie kaj tie — sur la rokaj deklivoj de la montoj — kreskis arĝent-grizaj malaltaj oliv- kaj migdalarboj, avelarbustoj. Ĉu tio estas Hispanio!? — demandis mi surprizite kun iom da elrevigo, sidantan apud mi kunvojaĝanton. — Jes, tia estas Centra Kastilio, — estis la respondo. . .

Ĉi tiu malnova, suplena lando,

sur kies tero ekzistis pluraj civilizacioj — romia, visigota, araba... posedas tian variecon de aspektoj, ke estas malfacile trovi pri ĝi precizan difinon. Iuj nomas ĝin „kontinento en miniaturo“ — tiom da kontrastoj estas en ĝi! Akrapintaj montoj kaj vastaj ebenaĵoj, grandaj orangplantejoj, rokaj marbordoj kaj orsablaj strandoj... Same kiel ĝiaj loĝantoj: malsamaj rasoj, diversaj lingvoj kaj kutimoj. Ĉi tiu mondo — multifaceta kaj koloriĉa, estas Hispanio. Kune kun la insulaj teritorioj — Kanarioj kaj Balearoj, kun Ceuta kaj Melilla en Afriko, Hispanio ampleksas teritorion de 500 mil kvadrataj kilometroj, kun populacio de 35 milionoj da loĝantoj.

Oni rakontis al mi, ke antaŭ multaj jarcentoj en Hispanio estis tiom da arbaroj, ke la simioj ne



Generala vidaĵo de la centro de Madrido

descendis desur la arboj... Sed kie do estas nun la arbaroj? Dum la multjaraj militoj kaj konkerantoj, kaj defendantoj bruligis ilin; la unuaj — por malebligi la sindefendantojn trovi ŝirmejon, la aliaj — por haltigi la invadulojn... Restis nur rokokaj bruligitaj teroj...

Post Taragono kaj Zaragozo, tra sennombraj tuneloj, ni eniris la valon de rivero Ebro. Longa oazo el maizkampoj, salikoj kaj olivar-

montras la momenton de subskribo de dokumento pri transdono far mia frato kaj mi de nia naskiĝdomo al la ŝtato, por ke oni organizu tie muzeon pri Trifon.

— Kion oni devus urĝe eldoni el la literatura heredaĵo de via frato?

— Estas preparata solida volumo el liaj plej gravaj verkoj. Ĝi enhavos: „Mia Vivo“, parte la du publikigitajn broŝurojn („La Morto de Hristo Botev“ kaj „Problemoj de la vilaĝo“), du nepublikigitajn manuskriptojn, parton de la leteroj, recenzojn pri lia verkaro, rememorojn pri li, liajn publikaĵojn en la landa kaj fremdlanda gazetaro.

Esperanto-Asocio de GDR preparis broŝuron kun leteroj de Hristovski al germana esperantisto-demokrato kun komentoj pri eventoj el la tridekaj-kvardekaj jaroj. Ĝi aperos en Bulgario.

— Ĉu menciindas kontaktoj de Trifon Hristovski kun polaj pacbatalantoj?

— Kompreneble indas rememori ankaŭ pri liaj korespondligoj kun polaj esperantistoj. Bedaŭrinde, ne konserviĝis lia tuta koresponda arkivo. Estas konservita la originalo nur de unu letero de la pola esperantisto Wladislaw Zablocki. Krome, en la ĉiutaga gazeto „Zarja“ (Mateniĝo) Trifon Hristovski publikigis serion da artikoloj sub rubriko „Miaj internaciaj amikoj“. En iu el tiuj artikoloj li rakontas pri sia pola korespondanto Wl. Zablocki, komunista-internaciisto (gaz. „Zarja“, n-ro 5891/1940). Depost 1933 li ne plu respondis al la leteroj de Hristovski kaj lia plua sorto ne estas konata. Eble la polaj amikoj povus doni informojn pri Zablocki.

Intervjuis: Czesław kaj Tereza BIEDULSKI, Varsovio

„NI VIVOS“ SONDISKE

Aperis grandformata sondisko, kun la dokumenta dramo de Julian Modest „Ni vivos“ (Balkanton — stereo — BAA 12139). La allogan kovrilon pentris Valentin Stefanov. La bonkvalitan sonregistradon efektivigis skipo ĉe Bulgara Radio: reĝisoro — Zdravko Mitev, muzika arango — Violeta Topalova, fotisto — Svetoslav Popov. Rolas la geaktoroj Veneta Zjumbuleva, Belka Beleva, Konstantin Pavlov, Reni Kitanova, Mihail Cobanov, Teodor Jurukov, Nikola Stefanov kaj Mihail Zdravev. La disko estas omaĝo al la 100-jara jubileo de Esperanto.

V. DIMITROVA



baroj sur ambaŭ riverbordoj. La legenda, historia Ebrol! Tie ĉi dum la civitana milito en 1936 la respublika revolucia armeo kuraĝe batalis kontraŭ la faŝistaj trupoj. En la bataloj de la armeo de la Popola Fronto batalis por la libereco de Hispanio elsub la diktaturo de l'faŝismo la internaciaj brigadoj, en kies vicoj estis multaj bulgarioj-interbrigadanoj. Dekoj (inter ili ankaŭ esperantistoj) restis por ĉiam en la hispana tero. . .

Hispanio! Lando de libera heroa popolo, doninta al la mondo grandajn ŝtatvirojn, militestrojn, marnavigistojn, sciencistojn, verkistojn, komponistojn. . . Lando de revoluciuloj kaj martiroj, de batalantoj por libero kaj homaj idealoj, en la nomo de plej helaj idealoj! . . .

. . . Ĉe la centra stacidomo Madrido-Camartin atendis nin nia bona amiko José Fernandez Arroyo — konata hispana poeto, pentristo kaj skulptisto, aktiva esperantisto. Kune kun li antaŭ tri jaroj ni pasigis agrablajn tagojn dum la unua internacia festivalo de foto-kino-amatoroj-esperantistoj, okazinta en la Internacia-Esperanto-Kursejo en Pisanica. José estis ravita de nia lando kaj dediĉis al ĝiaj naturrelaĵoj inspiritajn poemojn. Nun en lia artisme aranĝita loĝejo en Madrido ĝis noktomezo ni babilis kaj rememoris agrablajn travivaĵojn, komunajn amikojn. Ekde la sekvanta tago atendis nin streĉa, sed riĉa, interesa programo!

EMOCIPLENA RENKONTIGO

. . . En la salonego de Madrida Esplanto-Liceo sur strato Atoĉa, en la centra parto de la urbo, estis kunvenintaj membroj de la liceo — diversaj, kun diversaj profesioj kaj malsamaj mondkonceptoj, venintaj por bonvenigi nin, konatigi kun esperantistoj el fora Bulgario, aŭskulti mian unuan prelegon pri la historio de la bulgara esperantista movado kaj pri ties internaciaj rilatoj.

La juna energia prezidantino de la liceo Guadalupe Sanz Bueno prezentis nin al la ĉeestantoj kaj anoncis tiun renkontigon kiel vesperon de hispana-bulgara esperantista amikeco. Dum mallonga ceremonio mi transdonis la elkorajn salutojn de la bulgara esperantistoj kaj enmanigis al ŝi la orajn jubileajn medalojn, per kiuj la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio distingis elstarajn hispanajn esperantistojn okaze de la 80-jariĝo de BEA. Kiel specialan donacon de BEA al Madrida Esperanto-Liceo lige kun la 100-jara jubileo de la Internacia Lingvo Esperanto mi transdonis metalan plaketon kun bareliefo de d-ro Zamenhof, pro kio ŝi, ino Bueno korusite esprimis sian kaj tiun de siaj kolegoj dankon.

En mia prelego mi revenis al la unuaj jardekoj de nia jarcento kaj al la dramaj eventoj de la hispana civitana milito, pri kiuj la bulgaraj progresemaj medioj informigadis zorgoplene kaj helpoprete; al la tagoj, kiam la bulgara publicisto-

esperantisto Trifon Hristovski publikigis sian faman leteron defende de la popola kontraŭfaŝisma fronto en gazeto „Popola Fronto“, eldonata en Esperanto de Hispana Esperanto-Asocio. . .

Hispanio kaj Bulgario — du malproksimaj unu de alia landoj, sed proksimaj pro siaj historiaj sortoj! Multajn bulgarajn kaj hispanajn esperantistojn ligas sincera amikeco. Adonis Gonzalez Meana — esperantisto-veterano el urbo Gijon, estas libervola peranto de nia revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj jam de jaroj zorgas pri ĝia regula disvastigo en Hispanio. Konstantaj kaj fruktodonaj estas la kontaktoj inter niaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj intersangas valorajn eldonaĵojn kaj esperantaĵojn. S-ro Luis Yzal — fondinto kaj direktoro de la Hispana E-muzeo en Sant Pau d'Oral, kune kun sia edzino, estis oficialaj gastoj dum la festaj aranĝoj en Veliko Tarnovo en 1982, okaze de la 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio. Dum sia partopreno en la kino-festivalo en Pisanica José Arroyo faris dokumentan koloran filmon „Ĉarmaj Rodopoj“. Kelkaj junaj hispanaj esperantistoj jam laboris en Bulgario en diversaj internaciaj junularaj E-laborbrigadoj. La juna esperantisto Hektor Alos el Katalunio edziĝis al nia samlandanino-esperantistino Adriana Berberova, instruistino el Kjustendil, kaj ili jam havas fileton. Jen — Esperanto eĉ parencegas bulgarojn kaj hispanojn! . . .

Post mia prelego niaj gastigan-

Honore al la Oktobra Revolucio

La festotago okazis la 31-an de oktobro pasintjare en la Junulara Domo en Jambol. Sub la slogano „Nacia recitalo — 70 jaroj de la Granda Oktobro“ prezentis sian arton — pri recitado kaj kantado 24 individuaj partoprenantoj kaj 7 artkolektivoj el la urboj Jambol, Stara Zagora, Plovdiv, Târgoviște, Ruse, Razgrad, Ĉepelare, Sofio. La DE de BEA ĉe-kape kun ĝia vicprezidanto Dimităr Hrišov proponis plej bonajn kondiĉojn por rezultodona laboro. La partoprenantojn salutis Petăr Todorov — vicprezidanto de BEA.

La repertuaron konsistigis verkoj de klasikaj kaj nuntempaj sovetiaj, bulgaraj, kaj alinaciaj poetoj: Majakovskij, Esenin, Smirnenski, Ml. Isaev, O. Orlinov, N. Hikmet kaj ankaŭ originalaj E-versaĵoj de Iv. Zlatarski kaj Hr. Gorov. El ili fluis ardaĵ vortoj pri heroeo, libero kaj paco.

La plenumantoj estis bone preparitaj. Oni povis konstati la logikon de la teksto, la ĝustan komprenon de ĝia enhavo, klaran prononcadon en korekta Esperanto.

Feliĉe, ĉi-foje mankis dialekta influo en la elparolo de iuj vortoj, bone aŭdeblaj estis la akuzativaj finaĵoj. La programo de iuj el la artkolektivoj (ĉu nur parola, ĉu akompanata per kantoj) surprizis nin per eltrovo de interesa formo, kiu elmontris la senperan ideon de la komponaĵo.

Nin ĝojigis la fakto, ke la bone prezentita arta ple-

numo estas ankaŭ rezulto de la laboro de sperta entuziasma pedagogo.

Al la estontaj partoprenantoj en la deklamkonkursoj la jurio faris kelkajn rekomendojn:

Kutime sur la prepozicio kaj la konjunkcio ne estas akcento. Erare oni prononcas „En la batalon“, „Al propra“, „Ke se ne estas“. Tiamaniere oni rompas ankaŭ la ritmon de la verso.

Oni devas uzi la ĝustan akcenton de propraj nomoj: „Nevà“, ne „Néva“, aŭ de ordinaraĵ vortoj: kial, hodiaŭ.

Ĉe vortoj kun apostrofo oni devas prononci la konsonanton eksplode: estont', mond' ktp.

La publiko varme reagis, aplaudis la arton de la junuloj, kantis, ritme skandis kune kun iliaj plenumoj.

Riĉa travivaĵo estis la ekskurso al la ruinoj de la antikva traca urbo KABILE apud Jambol.

Iliana ILIEVA

LISTO DE PREMIITOJ

I. INDIVIDUAJ PLENUMANTOJ

Unua Premio:

Ilijana Petkova el St. Zagora

Conka Stojanova el Sofio

toj surŝutis min per demandoj. Ili emis ekscii pri nia socialisma vivmaniero, pri la akiraĵoj de la laboruloj en la socia kaj kleriga sfere kaj speciale pri la proceso de renovigo kaj rekonstruado en Bulgario. Apartan intereson la ĉeestantoj montris al la mastrum-agado de BEA, al ĝia instrulaboro kaj preparo de kvalifikitaj lektoroj de Esperanto. Estis tuŝita ankaŭ la problemo pri varbado de junuloj, kiuj restu en la movado, fininte diversgradajn kursojn.

Kun ĝojo ni aŭskultis laŭdajn vortojn pri la spektakloj de Bulgara Esperanto-Teatro dum la kongreso de HEF en Madrido en aprilo pasintjare. Miaj malnovaj amikoj kaj kolegoj Gian Carlo Fighiera, estrarano pri financaĵ aferoj de UEA, kaj lia edzino Ada Sikorska, ĉefredaktoro de gazeto „Heroldo de Esperanto“, esprimis sian admiron pro la majstra prezento de du hispanaj teatraĵoj „Pikniko sur la batalkampo“ de Arrabal kaj „La kaverna de Salamanka“ de Cervantes, per kiuj la bulgaraj geaktoroj ravis la hispanan publikon.

Al la licea biblioteko ni donacis kelkajn ĵus eldonitajn en Esperanto librojn de BEA: elektitaj verkoj de Jordan Jovkov, Hristo Botev, Nikola Vapcarov, Hristo Smirnenski, Antologio de Nuntempa Bulgara Poezio, „Mia verda pado“ de Hristo Gorov, „La glaciokovrita ponto“ de Ljuben Stanev kaj ankaŭ mian libron „En la mirinda mondo de la kino“. Estis agrable por ni vidi en tiu biblioteko multajn aliajn

bulgarajn librojn eldonitajn en Esperanto. Ankaŭ ni ricevis donace kelkajn hispanajn esperantajn eldonaĵojn.

Nia unua renkontiĝo kun madridaj geesperantistoj daŭris ĝis malfrua vespero en agrabla amika etoso, kun viglaj konversacioj kaj regalo per diversaj hispanaj kaj bulgaraj frandaĵoj.

EKKONI MADRIDON ...

En sunbrila mateno, sub tute blua sennuba ĉielo, la termometro montris jam 28°C! Nia gastiganto José alveturigis nin per eleganta vagonareto de metroo al la centra urba placo Puerta del Sol (Pordo de l'suno) kaj, iom ruzmiene enmaniginte al ni la urboplanon kaj kartojn por la tuta urba trafiko, kuraĝige diris: „Nun vi solaj povas ekkoni Madridon“. . . Nature, en daŭro de kelkaj tagoj tio ne eblas, sed ni decidis antaŭ ĉio enspiri la aromon, la atmosferon de tiu plurvizaĝa, antikva kaj moderna urbeĝo kun preskaŭ kvinmiliono loĝantaro. Antaŭ ol ekveturi al Hispanio, ni estis legintaj ne malmulte pri tiu fora lando kun riĉega historio kaj iom mistera ĉarmo, sed nun ni mem devis travivi la emocian aventuron malkovri ĝin, vidi kiel eble plej grandan parton de ĝi, ĝui ĝiajn rimarkindajn vindaĵojn kaj naturbelaĵojn. Kaj komenci de Madrido, proklamita kiel ĝia ĉefurbo en 1606 de reĝo Filipo III. De kie starti? Kien iri unue? Ja ekzistas kelkaj Madridoj — tiu de Mezepo-



La historia Plaza Mayor en Madrido

ko; tiu de la Aŭstria Korto; Madrido de la Burbonoj; tiu de la romantika periodo — komence de la 19-a jarcento, kaj Madrido nuntempa. . .

Ni staris meze de Puerta del Sol, kun la urba plano enmane, atente esplorante ĝin. Sur tiu ĉi placo kruciĝas preskaŭ ĉiuj linioj de la urba trafiko. Evidente ĉiu novveninto komencas sian promenadon tra Madrido de ĉi tie, ĉar sur Puerta del Sol svarmis turistoj diversnaciaj kaj oni povis aŭskulti krom la hispana, ankaŭ multajn aliajn lingvojn. Jen grupeto da japanoj,

Dua Premio:
Daniela Dančeva el Sofio
Rajna Šopova el Plovdiv

Tria Premio:
Milan Hristov el Jambol
Cvetelina Lateva el Sofio
Marinela Dineva el Targovište

Kuraĝigaj premioj:
Aneta Ivanova el Jambol
Maria Manolova el Sofio
Todor Atanasov el Jambol
Dančo Dančev el Plovdiv
Ivan Paraškevov el Jambol

II. ARTKOLEKTIVOJ

Unua Premio:
Grupo „Tintileto“ el Ĉepelare

Dua Premio:
Kantgrupo „Fajreroj“ el Targovište

Tria Premio:
Grupo el Jambol pro plenumo de verko de Sergej Esenin
Grupo el Razgrad pro plenumo de verko de Orlin Orlinov

Jurio:
Prezidanto: Belka Beleva, aktorino
Membroj: Mihail Ĉobanov, reĝisoro
Todor Dermengiev, aktoro

PREMIITA POETINO

La konata bulgara E-poetino Penka Batoeva gajnis II premion en la Itala Nacia Konkurso pri poemoj „Movado por la vivo de Savagliano (19. 9. 1987) per la versaĵo „Rememoroj vi karaj“. Jen la motivo de la juro: „La aŭtorino esprimas kun arta efikeco la vakuon lasitan de rememoroj, kun kiuj ŝi jam kutimiĝis kunvivi, tiom ke ŝi ne kapablas plu senti sin ekzistanta sen ilia ĉeesto.“

La premiita poemo estas presita en la poemaro „Il cantavita“, 1987.

Ĉi-sube ankaŭ ni donas lokon al ĝi.

P. R. BATOEVA

REMEMOROJ VI KARAJ

Kiel perdita
malproksima rememoro
via vizaĝo
alvenas al mi
kaj ĉiam muta,
kaj ĉiam senvorta
forfalis tenebren
sen adiaŭi kun mi.
Kien vi iras,

rememoroj vi karaj.
Kun via ĉeesto
mi vivis ĝis nun,
ne lasu min sola
en ĉi malvarmo,
— en falso amara
de homa envi',
ne lasu min mortl
sen vil

Jen ĝejnuloj blondharaj kun grandaj dorssakoj, nudpiedaj, sidantaj sur la balustrado de la fontano kaj manĝantaj grandajn sandviĉojn. Malrapide ni ekiris laŭ Calle Mayor kaj direktiĝis al la historia Plaza Mayor. Ni tuj dronis en la atmosferon de la madrida Renesanco: la bone konservigitaj konstruaĵoj de XVI—XVII jarcentoj formas rektangulon. Sur tiu ĉi placo en de longe pasintaj tempoj estis organizataj kavaliraj turniroj, taŭroludoj, ĉi tie estis kanonizitaj hispanaj sanktuloj kaj solene proklamitaj multaj hispanaj reĝoj, inter kiuj Filipo V, Ferdinando VI kaj Karlo IV. Ĉi tie la „sankta inkvizicio“ ŝtiparumis herezulojn, kiuj kuraĝis protesti kaj batali kontraŭ la eklezio. . .

Irante laŭ Calle del Arenal, ni libere eniris la Reĝan Palacon — iu el la plej belaj en Eŭropo, kiun konstruigis en franca arkitektura stilo la unuaj monarkoj de la Burbona dinastio. La palaco situas sur vasta tereno, kiu ampleksas tutan kvartalon. Sur la gazono de la vasta bonege aranĝita kaj prizorgata parko kuŝis multaj ripozantaj vizitantoj diversnaciaj, infanoj ludis kun ŝipmodeloj en la artefaritaj lagetoj. . . Ankaŭ ni serĉis ŝirmejon kaj freŝecon sub la ombro de la pinioj, ĉar la temperaturo jam superis 37°C! La intensa trafiko — centoj da aŭtomobiloj kaj motorcikloj, sufokigis nin per benzinaĵo gasoj kaj por ni la reĝa parko estis vera oazo. Ankaŭ ni senĝene havis nian sandviĉan lunĉon ĉi tie kaj refreŝigite, daŭrigis nian ekskurson.

Preterpasinte la faman Madridan Ŝtatan Operejon, kie ofte gastludas eminentaj bulgaraj kantistoj kaj muzikistoj, ni atingis placon Hispanio kun la monumento de Miguel de Cervantes. La mondfama verkisto, aŭtoro de la senmorta romano „Don Kiĥoto de la Manĉa“, desur sia piedestalo kun patra tenero rigardas siajn idojn — don Kiĥoto sur la ĉevalaĉo Rosinanto kaj Sanĉo Pansa sur la ĉiam obeema mulo, kies statuoj en natura grandeco staras sur la soklo de la monumento. . . Ni ne preterlasis la eblecon fari memorfoton — dank' al la komplezemo de turista mezaĝa geedza paro el Kolumbio. Ili estis agrable surprizitaj konatiĝi kun bulgaroj. „Ah, Bulgario?! Jorge Dimitrov! . . . — ĝojekkreis la viro. — Salut' al via lando! . . .“

Proksime de Plaza de España (Placo Hispanio) estas la granda bela parko La Rosaleda, en kiu kreskas diversspecaj subtropikaj arboj kaj floroj: palmoj, pinioj, magnolioj. De la plej alta parto de la parko ni ĝuis la panoramon de la nord-okcidenta regiono de la urbo, kvazaŭ flamanta en la posttagmeza nebuleto. Ĉi tie nin atendis surprizo: sur la altaĵo staris originala egipta monumento — la templo Debod! . . . Pro grandaj kontribuoj de Hispanio al la translokigo de komplekso de antikvaj temploj en la Valo de Asuan kaj ilia konservado por la generacioj, la egipta registaro donacis tiun templon al la hispana popolo. Do, en Madrido ni havis renkontiĝon kun antikva Egiptujo! Multaj aŭtentikaj skizoj

kaj fotografiaĵoj en speciale aranĝita ekspozicio en la templo montras al la vizitantoj la ĉefajn momentojn de ties demuntado, transportado kaj rekonstruo sub la gvidado de hispanaj arkeologoj kaj inĝenieroj.

Per la metroo ni rapide atingis Plaza de Colon (Placo de Kolumbo) — la lastan punkton de nia ekskurso. La statuo de la legenda marnavigisto — admiralo Kolumbo, staris sur alta kolono, ĉe kies fundamento ŝprucis akvostrioj en granda baseno. La monumenton kompletigas memorkomplekso, sur kies ŝtonaj flugilformaj muroj estas elĉizitaj la nomoj de plej eminentaj hispanoj, famigintaj sian patrujon.

Marŝante suden laŭ Paseo de recoletos, ni preterpasis la Nacian Bibliotekon, kies fasadon ornamas statuoj de la plej famaj hispanaj verkistoj kaj sciencistoj. Post la Ekspozicikomplekso kaj la Arkeologia Muzeo ni atingis Plaza de la Cibeles kun la grandega fontano, kies akvostrioj ŝprucas ĉiudirekten. Vidalvide de la impona blanka Palaco de Poŝtoj kaj Telekomunikado, en kies arkitekturo videblas certa influo de la maŭra stilo, ni renkontiĝis kun s-ino Bueno en koketa subĉiela kafejo.

. . . Je vesperigo, ĉe taso de aroma forta kafo, post tuttaga vagado tra la urbo, ni finfine povis ripozi kaj amike konversacii kun la prezidantino de la Madrida Esperanto-Liceo.

(Daŭrigota)

Akad. Sergej Boev



Jam ne plu estas inter ni akad. Sergej Nikolaevič Boev, malnova esperantisto, unu el la pioniroj de la bulgara-soveta amikeco pere de Esperanto, honora membro de BEA. Li forpasis la 12-an de julio 1987 en urbo Alma-Ata, Sovetunio.

Sergej Nikolaevič Boev estis direktoro de la Zoologia Instituto de Kazania Akademio de Sciencoj. Li havis daŭran interson pri la laboro de medicinaj kaj biologiaj Esperanto-Fakuloj.

Mi konas lin jam de la periodo de lia studenteco — la fino de la dudekaj jaroj. Mi mem tiam estis studento de agronomio kaj li — de veterinara medicino. Kiel ni farigis korespondamikojn nun mi ne povas rememori. Sed ni aktive korespondis kaj pri seriozaj temoj. Pruvo pri tio estas interalie la fakto, ke mi, kiel redaktoro en la maldokstra studenta gazeto „Studenta Tribuno“, publikigis en n-ro 13-a de 8-a de marto 1929 lian korespondadon titolitan „La Supera Veterinara Instituto en u. Saratov“. Tute certe mi estas publikiginta ankaŭ aliajn liajn leterojn-korespondadojn en diversaj proletaj gazetoj — esperantistaj aŭ neesperantistaj. Fakte nun estas ege malfacile trovi kaj citi la koncernajn numerojn. Tiu aserto tamen restas valida. Pruvo pri ĝi estas ankaŭ la tre intensa korespondado inter Boev kaj la juna tekslaboristino el u. Sliven Tinka Lakova, nun veteranino de la Bulgara Esperanto-movado. Ŝi ricevis de Boev unuajn lecionojn kiamaniere skribi siajn leterojn, por ke ili estu taŭgaj por publikigo en neesperantistaj sovetaj gazetoj. Kaj li fakte peris al diversaj redakcioj leterojn-korespondadojn de Tinka, kiujn la redaktoroj publikigis kiel artikolojn speciale senditajn al ili el Bulgario. Same agis Tinka rilate la leterojn de Boev mem.

Ŝi tradukis ilin en bulgaran lingvon kaj liveris ilin al la redakcioj de „Laboristino“, „Pogled“ (Rigardo), „M. Rabselkor“ (Internacia laborista-kampana kores-

pondanto) k.a., kiuj donis lokon al tiuj interesaj materialoj.

En la jam menciita letero de Boev en „Studenta Tribuno“ li priskribas la vivon de la studentoj el lia instituto kaj tiamaniere pentras bildon pri la vivo de sovetaj studentoj ĝenerale.

Nia plum-amikeco daŭris multajn jarojn sen persona konateco.

Sed okazis tiel, kiel diras la bulgara proverbo: „Monto kun monto ne renkontiĝas, tamen homo kun homo renkontiĝas“. Foje oni informis min el la Bulgara Akademio de Sciencoj, ke ilia gasto estas soveta profesoro, akad. Sergej Boev, kiu petis organizi al li renkontiĝon kun mi kaj aliaj liaj malnovaj plum-amikoj-esperantistoj. Ni ĝoje akceptis tiun inviton kaj en la malgranda salono de la Akademio ni por unua fojo vidis nian malnovan korespondanton el la Veterinara Instituto de u. Saratov, Kompreneble, nek li, nek ni plu estis la iamaj junaj esperantistoj. Ni ĉiuj jam estis grizharaj, sed niaj animoj restis kiel antaŭe junaj, sciamaj, entuziasmaj. La konversacio estis intima kaj multe ĝojigis kiel akademianon Boev, tiel ankaŭ nin — liajn iamajn plumamikojn. Al tiu memorinda renkontiĝo mi dediĉis duonpaĝon en mia libro „La Ruĝa Torĉo“. Kiam ĝi aperis

en la sindikata eldonejo en 1976, Boev loĝis en la ĉefurbo de Soveta Kazahstano, Alma-Ata. Per mia kamarado, la soveta historiisto Josif Portnoj el Karaganda mi salutis nian komunan amikon Sergej Boev kaj sendis al li mian libron. Tio okazis post la oficiala festa ceremonio lige kun lia 80-jariĝo en 1985.

Akad. Sergej Boev ne plu estas en niaj vicoj, sed lia samlandano doc. Josif Portnoj verkis sufiĉe detalan libron pri li — de la infanago ĝis la suproj de la scienco. Ni esperu, ke tiu vivo-skizo pri akad. Boev aperos en bulgara kaj en Esperanto, por ke pli multe da homoj en Bulgario kaj en eksterlando ekkonu la meritojn de tiu rimarkinda scienculo kaj esperantisto.


Mi permesas al mi fari ekstraktan el la manuskripto de doc. Portnoj:

„Inter la scienculoj de Sovetia Kazahstano, konataj ne nur en la frataj respublikoj de USSR, sed ankaŭ en aliaj fremdaj landoj, indan lokon okupas akad. Sergej Boev, doktoro pri biologiaj sciencoj. Li estas unu el la plej aktivaj entuziasmoj, kiuj kreis dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj de nia jarcento la fundamenton de la nepromplebla soveta-bulgara amikeco.

La biografio de Sergej Boev estas nedisigeble ligita kun la revolucia batalo de la bulgara popolo kaj kun la agado de la esperantistoj-antifasistoj de la 20-aj kaj 30-aj jaroj, kaj aktuale — kun Bulgara Esperantista Asocio.“

Nikola ALEKSIEV,
esperantista veterano

Forpasis arda esperantisto



La 8-an de septembro 1987 forpasis unu el la plej fidelaj esperantistoj en Kazanlāk, E-veterano MINJU EDREV MINEV, naskita en 1904. Gimnazion li finis en Stara Zagora kaj superan agronomian klerecon — en Sofio. En 1929 li forveturis Germanion, kie li specialiĝis pri senalkohola konservindusio.

Esperanton li lernis en Stara Zagora kiel lernanto en la kurso

de Kasabov en 1921. Por Esperanto li laboris en Pleven, kune kun Ivan Sarafov, en Smoljan, Nova Zagora kaj Sliven kune kun d-ro Stefan Kadijev kaj en Kazanlāk, kie oni elektis lin prezidanto de E-societo Roza Valo. La periodo 1937—1940 estis unu el la plej fruktodonaj por la Kazanlāk societo. Malgraŭ ke la polico observis lian agadon, Edrev helpis al la progresmaj junuloj, kiuj per Esperanto laboris porpaco kaj kontraŭ la faŝismo. Post la 9-a de Septembro 1944 li estis sekretario de la societo, estrarano.

Minju Edrev estas konata en Kazanlāk kaj ĝia regiono kiel propagandanto de la moderna agrikulturo, kiel kooperativa aganto kaj abstinenculo. Li verkis ankaŭ librojn pri konservado de nutraĵoj. Lia lasta libro estas: „Suna nutraĵo por nia mangotablo“.

Minju Edrev estis honorita per multaj distingo kiel agronomo kaj per la Ora Insigno de BEA por aktiva agado.

Ni kliniĝas antaŭ lia kara memoro.
Dimo MARTINOV

AFRIKAJ ESPERANTISTOJ VENIS SPERTIGI EN HUNGARIO

Enkadre de dumonata restado en Centra Eŭropo, grupo de junaj afrikaj esperantistoj — antaŭ ol ekveturi al la jubilea Universala Kongreso en Varsovio — pasigis 4 semajnojn en Hungario. La invitanto estis Hungara Esperanto-Asocio, sed la vojaĝon materie ebligis UEA pere de la Fondaĵo Azio-Afriko. La teamon gvidis s-ro Hans Bakker, unu el la ĉefaj iniciatoroj de la afrika Esperanto-movado, kaj svedino Anita Lindblom.

La hungarlanda restado en Budapeŝto kaj Szeged nelis amuziĝon kaj distron, malgraŭ tio, la afrikaj gastoj (el kiuj la plimulto estis la unuan fojon en Eŭropo) ĝuis ĉion, precipe la imponajn vidindaĵojn de la Danub-borda ĉefurbo. Ili tamen venis ĉefe por partopreni progresigan kurson. La lingvon mem sufiĉe bone posedis ĉiuj. Kompreneble ili perfektigis sian lingvoscion, kaj konatigis ankaŭ kun la elementoj de la Esperanta movad- kaj literaturhistorio, sed la ĉefa celo de la kurso, laŭ la peto de UEA, estis alproprigi la diversajn metodojn de la instruado de Esperanto, precipe la t.n. Cseh-metodon, kies naskolando estas ĝuste Hungario.

Tiuj junuloj, pere de la kapablo akirita en Hungario, estos la unuaj Afrik-devenaj instruistoj de Esperanto. Kiel disvastigantoj kaj instruistoj de la lingvo, ili devos stari sur siaj propraj plandoj. Pro tio la unumonata restado vere estis plenŝtopita de instruprogramoj. La modesta studenthejmo en Budapeŝto, kie ili unue loĝis, certigis la eblecon de la tuttaga lingvolernado, kaj la instruistoj — Ferenc Jáki, Eva Farkas, Stefano MacGill, Klára Velösy, Orsika Kiss, Oszkár Princz kaj Sándor Péter — prezentis la diversajn variantojn de la rekta metodo. La antaŭtagmeza programo ĉiutage estis metodologio, kiun posttagmeze sekvis 2—3 studhoroj por perfektigi kaj glatigi la parolkapablon. La junuloj, kiuj lernis la lingvon per korespondado, bezonis tion, ĉar en ilia prononco estis kelkfoje aŭdebla ĝena influo de la franca lingvo.

La tuta taĉmento konsistis el 13 junaj viroj, kiuj venis el 9 landoj. Ili konis nek unu la alian, nek la gepatrajn lingvojn unu de la aliaj, do la ĉefa lingva komunikilo estis Esperanto. Se kalkuli, ke ankaŭ la gvidantoj, instruistoj kaj helpantoj estis diversnaciaj, eĉ diverskontinentaj: Anita Lindblom el Svedio, Hans Bakker el Nederlando, s-ino Wang Lin el Ĉinio, MacGill el Novzelando — la eta mikrokosmo fariĝis bona modelo de la internacia kunlaboro pere de Esperanto.

Jen la nomoj, kiuj eble post kelkaj jaroj estos vaste konataj en Esperanto: Mohamed Bettahar, Brahim Djilali (Alĝerio), Alphonse Diatta (Senegalio), Cæmeroon Sackey (Ganao), Nzaniye Bernard (Tanzanio), Tchikpe Privas (Benino), Jean-Marie Mboke-Mbele, Thomas S. Wang (Kamerunio), Gbego Koffi, Mensah A. Agbemadon (Togolando), Antoine Kouassi Kouabalan, Yassi Ambroise (Ebura Bordo), Luc Feidangai (Centrafrika Respubliko)

Péter SANDOR (Hungario)
(El „Esperanto“, n-ro 176/1987)

NOVA INFORMILO

Sofia Urba Organizaĵo de BEA komencis aperi trimonatan „Informilon“. Jam aperis kvar kajeroj. La bultenon redaktas kaj tajpas senpage tri entuziasmoj: Nikola Nikolov, Haim Levi kaj Asen Josifov. La 1300 ekzempleroj de tiu modesta, sed necesa eldonaĵo ricevas la organizitajn sofiajn esperantistoj. Per ĝi oni ekscias pri okazintaj aŭ okazontaj esperantaj aranĝoj en la urbo, pri gravaj iniciatoj kaj problemoj

Opinio

POR EFIKA INSTRUADO

La informado pri Esperanto estas efektivigata per afiŝoj, flugfolioj, prelegoj, aperigo de artikoloj kaj sciigoj, radio-kaj televidaj elsendoj, arango de propagandaj vitrinoj, belartaj programoj kaj turismaj aranĝoj.

La instruado kaj la lernado de la lingvo progresas precipe en la lernejoj. Tie estas pli facila la organizado de kursoj. Tamen ni devas strebi organizi pli da kursoj por ĝejnuloj kaj plenkreskuloj. Ĉefe el tiuj kursoj venas en niajn vicajn novaj, agemaj kaj entuziasmaj geesperantistoj.

La instruado kaj la lernado de Esperanto ne devas esti memcela. Dum la instruado de Esperanto niaj institutoj kaj kursgvidantoj ĉiuhore devas paroli pri la historio de la lingvo, pri la movado, pri la sukcesoj, kiujn ili atingis en Bulgario kaj en eksterlando, pri la neceso aktivadi en la movado kaj disvastigadi la aplikadon de la lingvo.

Kursgvidantoj, kiuj nur instruas Esperanton kaj ne klopodas konvinki siajn kursanojn fariĝi entuziasmaj kaj aktivaj organizitaj agantoj en la esperantista movado, nur duone plenumis sian devon. Niaj diversgradaj kursoj devas esti forĝejoj de kadroj por la movado. Sen tio la movado ne progresos kaj la lingvo ne estos vaste uzata kaj aplikata.

Nikola NIKOLOV

ARTIKOLO DE BULGARA SCIENCISTO

En revuo „Humankibernetik“ (Eldonata en Paderborn, GFR) n-ro 3/1987, estas publikigita esperantlingve artikolo de nia sciencisto docento ing. Stojĉo D. Stojĉev. La titolo de la artikolo estas „Nova rapida proceduro por enklasigo de grafikodoj“. Pri la sama temo li prelegis ankaŭ dum la IV sesio de la Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino. En revuo „Humankibernetik“ oni publikigas sciencajn artikolojn en germana, angla kaj franca lingvoj kaj en Esperanto.

KONFERENCO DE VEGETARANOJ

La 4-an de oktobro 1987 la Sekcio de Esperantistoj-Vegetaranoj kaj Esperantista-Vegetarana Societo „Paco“ en Subdistrikto „Proslav“ — Plovdiv, okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto organizis sian duan jubilean konferencon. Ĝin partoprenis 150 delegitoj kaj simpatiantoj el la tuta lando. Pri la jubileo prelegis esperantlingve la prezidanto de la sekcio M. Petkov. Pri interesaj sciencaj kaj medicinaj problemoj prelegis Kubrat Tomov kaj Lidija Kovaĉeva. La partoprenantoj spektis filmon pri la pentristino Lili Dimkova.

K. PAMUKOV

de la organizaĵo kaj pri la agado de niaj fakaj societoj kaj kluboj. Per koncizaj sciigoj „Informilo“ strebas instigi la legantojn aktivi en la movado kaj konstante praktiki la lingvon.

La opinio de la legantoj certe stimulus la estraron de la organizaĵo kaj la redaktantojn regule eldonadi la „Informilon“ — riĉenhava kun belaspakta eksterajo, bone redaktita, korektita kaj ĝustatempe sendata al la sofiaj geesperantistoj.

LERNEJANA E-MOVADO

La 7-an-20-an de aŭgusto ĉi-jare apud urbo Troick (Ĉeljabinska regiono) okazis la Jam Tradicia LETO-3: Lernejana Esperantista Tendaro. Ĝin partoprenis 25 lernejanaj kaj pedagogoj el 7 urboj de Sovetunio: Ĉeljabinsk, Togliatti, Moskvo, Tjumenj, Jaroslavl, Miass, Kirov.

En la tendaro estis 3 taĉmentoj gvidataj de komitato. Enkadre de LETO funkciis Redakcio, kiu respondis pri ĉiuj fakpaperaj aferoj (sloganoj, listoj, numeroj de ĉiutaga ĵurnalo „LETERO“ ktp). Lernejanaj laboris preskaŭ tute memstare, pedagogoj nur helpis — estis la Amikoj de la taĉmentoj, la Komitato kaj Redakcio.

Dum la restado en la Tendaro LETOanoj ripozis, plialtigis sian lingvonivelon, interŝanĝis sperton. Al ĉiuj plaĉis Kavalar Turniro dum Tago de Knaboj, Neptunfesto, ĉiutaga kantlernado. La tendara programo enhavis ankaŭ propagandan kaj porpagan laboron. Tendaranoj rakontis pri Esperanto al la lokaj vilaĝanoj, prezentis la kontraŭmilitan filmon „Estos karesa pluvo“, organizis pacloterion. Ankaŭ surkampe ni laboris — helpis rikolti pomojn kaj kukumojn. Tutan salajron dum Tago de Paco kune kun mono, akirita dum la pacloterion LETOanoj sendis al la Pacfonduso, entute 52 rublojn.

Fine de la tendaraj tagoj okazis granda resuma kunveno. Gastoj dankis organizantojn de LETO, precipe ĉefmastron V.G. Rojdestvenskij. LETanoj — geknaboj kaj pedagogoj — serioze preparolis sukcesojn kaj mankojn de la tendaro, adresitajn al sekva LETO, kiu okazos plej verŝajne ankaŭ en ĉeljabinska regiono.

Dum vi legas ĉi-artikolon, en lernejanaj kluboj jam komenciĝas preparado al LETO-4. Estu ĝi sukcesa!

Tatjana BAŠMAKOVA

ESPERANTO-TAGOJ EN LATVIO

Okaze de la Centjariĝo de Esperanto nia klubo ĉe Fervojista Kultura Domo en Liepaja aranĝis ampleksan ekspozicion. De la 14-a de septembro ĝis la 4-a de oktobro ĝi estis malfermita por la urbanoj.

En la ekspoziciejo estis prezentitaj ĉirkaŭ 300 libroj el Hungario, Bulgario, GDR, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Sovetunio k. a. Estis aranĝita vitrino kun diversaj esperantaj: insignoj, turismaj prospektoj, bildkartoj, markoj. En apartaj vitrinoj troviĝis eldonaĵoj kaj historiaj datoj de d-ro L. Zamenhof: blazono kaj lernolibro de la unua latvia esperantisto — Rudolf Libeski informmaterialoj pri la 72-UK.

Dum renkontiĝo kun urbanoj ni, du UK-delegitoj rakontis pri la Kongresa programo. Ni volonte diskonigis la grandajn eblecojn kaj atingojn de Esperanto sur fakaj kaj kulturaj kampoj.

Post ĉi tia propaganda laboro estis organizitaj E-kursoj en mezlernejoj kaj en la urba kultudromo.

Sed ne estas laboro sen problemoj. Por antaŭenigi la lernejan instruadon, ni bezonas modernigi la instrumentodikon, havigi kvalifikitan instruiston.

Ĉi-jare unue ni sukcesis organizi Studrondon de Esperanto en Pedagogia Instituto. Fakte plej ĝojiga por ni estas tio, ke la ĝejnuloj montras intereson pri Esperanto. Kaj ni esperas, ke post sukcesa komenco ni atingos kontentigajn rezultojn.

Dzidra VECBRALE,
Latvia, SSR

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO:

Ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (24. X. 1987) sub titolo „Letero el 50 landoj al Gabrova adreso“ donis lokon al detala artikolo kun fotoj de Dimitar Viktorov. pri pli ol duonjarcenta esperanta agado de Elena Kovaĉeva el u. Gabrovo; ĵ. „Oteĉestven Front“ (16. X. 1987) presigis intervjuon kun Clement Tholet el Belgio, ĝenerala sekretario de MEM; ĵ. „Veĉerni Novini“ (4. VII. 1987) aperigis recenzon de Venelin Mitev pri bulgaringva libro „Esperanto 100-jara“ de Nikola Aleksiev; la semajna gazeto „Anteni“ (14. X. 1987) publikigis leteron de Nikola Aleksiev pri la Esperanta eldono de la libro „Apostolo de Libereco“ de Mercia Macdermott; la faka semajna komerca gazeto „Socialistiĉeska Targovija“ (14. X. 1987) aperigis informon de Jordan Kalinov el Ruse pri esperanta traduko de „La Internacio“; la faka filologia revuo „Ŝpostavitelno Ezikoznanie“ (kajero 4/1987) aperigis grandan studon „Cent jarojn internacia lingvo“ de Violin Oljanov; la sama revuo (kajero 5/1987) presigis recenzon de Violin Oljanov pri la ruslingva libro „Teoria interlingvistiko“.

EN LA LANDO:

Ĵurnalo „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca (20. X. 1987) sub titolo „Esperantaj eventoj en Vraca“ donis lokon al tri informoj de Ljubomir Trifonĉovski; pri internacia konferenco je temo „Esperanto en la profesio“, kaj pri internacia E-seminario pri kosmaj esploroj, kaj pri akcepto fare de la urbestro de Vraca de Eksterlandaj partoprenantoj en tiuj du aranĝoj; ĵ. „Ŝumenska Zarja“ — u. Ŝumen (15. X. 1987) aperigis eltiraĵojn el la rememoroj de karmemora pioniro Kiril Bogatinski pri reĝo de francaj esperantistoj pri la heroeo de bulgarioj dum la Balkana Mondmilito; ĵ. „Ĥaskovska Tribuna“ — u. Ĥaskovo, en du numeroj (3. IX. kaj 5. IX. 1987) sub rubriko „100 jarojn Esperanto“ proponis eltiraĵojn el la presota libro „Vojo tra la jaroj“ pri historio de la esperantista movado en u. Ĥaskovo kaj la distrikto, de karmemora Luka Vâlcanov kaj Penju Stojanov. Eltiraĵojn el la sama libro pri la koncernaj urboj presigis ankaŭ la jenaj urbaj gazetoj: „Dimitrovgradska Prayda“ — u. Dimitrovgrad (18. VI. 1987), „Harmanlijski Zov“ — u. Harmanli (15. VII. 3. VIII, 2. IX. 1987); „Graniĉen Horizont“ — u. Svilengrad (25. VI, 7. VII, 2. IX. 1987); „Dimitrovsko Zname“ — u. Simeonovgrad (29. VII. 1987); la urba gazeto „Ĉepinec“ — u. Velingrad (26. VII. 1987) aperigis artikolon de Manol Ĉolev pri la jubilea 72-a Universala Kongreso en Varsovio; la sama gazeto (7. X. 1987) publikigis intervjuon kun kvar eksterlandaj partoprenintoj en internacia E-seminario, okazinta en Velingrad; la uzina gazeto „Duma na Metalurga“ — Aluminia Kombinumo en u. Ŝumen (25. IX. 1987) presigis tradukon el Esperanto pri historiaj lokoj en u. Leningrad, USSR, ligitaj kun la Granda Oktobra Socialisma Revolucio; la vilaĝa gazeto „Horizont“ — v. Mineralni Bani, distrikto de Ĥaskovo (9. IX. 1987) aperigis informon kun foto de Penju Stojanov pri sukcesa lernejana Esperanto-kurso.



JUBILEAJ TURISMAJ TAGOJ

De la 6-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1988 en Žilina okazos Jubileaj 10-aj Turismaj Tagoj. Por la partoprenantoj oni organizos tri tuttagajn piedekskursojn en la montaro Malgrandaj Tatroj kaj Sŭlov-rokaro, unu tuttagan busekskurson, traŝarĝon de la urbo, viziton de la muzeo, rostandon de lardo kaj vesperajn amuzajn programojn.

Venu ĝui amikan etoson inter esperantistoj-turistoj el diversaj landoj, venu admiri la belegan slovakajn naturon!

Aligilojn kaj informojn petu ĉe: Juraj Gondžúr,

Levočská 3,
CS-010 08 ŽILINA

RENKONTIGO POR INTERLINGVISTOJ KAJ ESPE- RANTOLOGOJ

La sekva 16-a Scienca Interlingvistika Simpozio okazos en Varsovio, 27.04.—01.05. 1988 sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo de UEA. La aranĝo fariĝis jam tradicia preleg-kaj diskutforumo, kiu kunvenigas fakulojn kaj aliajn Esperanto-movadanojn interesitajn pri diversaj aspektoj de internacia lingva komunikado. La simpozio estos dediĉita al la temo: Lingvo-Komunikado kaj Lingvo-Planado. La organizanto — Akademia Centro Interlingvistika — proponas pridiskuti la ĉeftemon laŭ jenaj subtemoj: Kultura kaj socipolitika aspektoj de la lingvo-planado, Sociologio de Internacia planlingva parolkomunumo; Specifeco de Es-

peranto rezultanta el ties planiteco.

Laŭ la sugestoj de pasintjaraj partoprenintoj, dum la simpozio okazos ankaŭ diskutoj pri Strategiaj demandoj de interlingvistiko.

Interesiĝuloj povas ricevi detalajn informojn de: Akademia Centro Interlingvistika, Ordynacka 9, 00-950 Varsovio, Pollando.

Ryszard ROKICKI,
aferviganto de ACI

KONFERENCO EN ĈINIO

La Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazos la 10-an—16-an de aŭgusto 1988 en Pekino, Ĉinio. La arangan organizos Ĉina Akademio de Sciencoj.

La temo estas „Reciproka efiko inter scienco, tekniko kaj socio“. Ĝi inkluzivos: la influon de la nova teknika revolucio al modernaj ekonomiko kaj socio; kiel la nova tekniko ŝanĝas nian ĉiutagan vivon; la sociutilo de rezultoj de sciencaj esploroj; nuntempaj medicinaj teknikoj — novaj metodoj de sanprizorgado, kuracado kaj preventado de malsanoj; nova teknika revolucio kaj la edukado.

Oficiala laborlingvo estos Esperanto.

Enkadre de la konferenco oni organizos ekskursojn tra Pekino.

Guste antaŭ la konferenco la sciencista-teknikista Esperanto-Asocio sub la aŭspicio de la Ĉina Akademio de Sciencoj organizas kurson de akupunkturo Esperantlingve de la 16-a de julio ĝis la 8-a de aŭgusto 1988 en Pekino. Dezirantoj por aligi skribu al: S-ino Wang Yuchin, Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52, Sanlihe, Pekino, Ĉinio.

AEST'88 EN POPRAD

Dum la periodo 3—5.8.1988 okazos en Poprad, en la montaro Altaj Tatroj, faka konferenco pri „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“ sub la titolo „Raciigo“. La celo de la konferenco estas interŝanĝo de spertoj inter fakuloj kaj personaj rilatoj.

Traktotaj temoj: Komputiloj — iloj de raciigo; tekstprilaboro, maŝintradukoj, informaj sistemoj, retoj, scienc-teknikaj kalkuloj, projektaj laboroj, grafiksistemoj, teorio de programado, sistemanalizo, aŭtomatigaj sistemoj; Raciigo de scienc-teknikaj laboroj: aŭtomatigo kaj robotigo, raciigo de industrio, ofic-laboroj, konstruado, energi-eksploatado kaj minado, agrikulturo, naturprotektado kaj trafiko; Prognozistiko: ĉefaj tendencoj de la evoluo en natursciencoj, teknikaj sciencoj kaj kibernetiko; Terminologio: terminologiaj laboroj en Esperanto kaj en naciaj lingvoj, lingvonormigo. Lingvo-planado kaj planlingvoj;

Prelegantoj, anoncu siajn kontribuojn ĝis la fino de marto. La manuskriptojn oni devas sendi ĝis la fino de aprilo 1988. Informojn kaj aligilojn petu ĉe: Ing. Juraj Britka, Velká Okružná 28 CS-010 01 ŽILINA, Ĉeĥoslovakio

Konkurso de Monda Turismo — 1988

La valoraj konstatoj kaj instrukcioj prezentitaj en la konkursaĵoj alvenintaj responde al la alvoko de Monda Turismo, kuraĝigas nin anonci novan konkurson por la jaro 1988.

Jen estas okazo, kiam ĉiu esperantisto povas kontribui persone al la agado de Internacia Asocio Monda Turismo. Por solvendaj gravaj kaj daŭre aktualaj taskoj ni petas viajn sugestojn kaj kunlaboron. En la ofertoj de Esperanto-vojaĝoficejoj, organizantoj de Esperanto-renkontigoj, ni povas aljuĝi premiojn por la plej valoraj kontribuoj: senpagan partoprenon en internacia Esperanto-aranĝo.

La temo de la konkurso 1988 estas:

„Kiel instigi funkciulojn, oficistojn, deĵorantojn, vojaĝgvidantojn, ĉiĉeronojn kaj aliajn laborulojn de la internacia turismo lerni Esperanton?“

„Per kio vi mem kontribuos al tiu ĉi agado?“

Ni atendas respondojn al ambaŭ demandoj.

Limdato por alveno de la konkursaĵoj (en 2 tajpitaj ekzempleroj): 30-a de septembro 1988.

La aljuĝo de la premioj okazos dum la 14-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo en Bydgoszcz, de la 25-a ĝis la 30-a de septembro 1988. Monda Turismo sin devigas publikigi la plej taŭgajn konkursaĵojn — fragmente aŭ plene.

Estraro de MONDA TURISMO

NACIAJ KAJ REGIONAJ ARANGOJ
KAJ ARANGOJ KUN INTERNACIA PARTOPRENO
DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO
DUM 1988

N-ro	ARANGO	DATO	LOKO	ORGANIZANTO
1.	Naciaj porinstruistaj feriaj E-kursoj — I—III grado	16—25. I.	Burgas	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
2.	Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE)	30—31. I.	Kubrat	E-societo „Progreso“, Kubrat
3.	Konsiliĝo de aktivuloj de la E-societoj lige kun la nova strukturo de BEA	14. II.	Sofio	Organiza Komisiono ĉe CE de BEA
4.	Revuo de Lernejana Amatora Arto	27. III.	Sofio	Instrukomisiono ĉe CE de BEA, Sofio
5.	Nacia Renkontiĝo de Turistoj-Esperantistoj	26—27. III.	Bakaĝicite	E-societo „M. Gorkij“ Jambol
6.	Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto	2—3. IV.	Stara Zagora	Junulara Sekcio ĉe CE de BEA
7.	Kurso por esperantistoj-tradukemuloj	1—3. IV.	Pisanica	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
8.	Naciaj porinstruistaj feriaj E-kursoj — I—III grado	1—10. IV.	Burgas	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
9.	Kvalifika kurso por instruistoj de Esperanto	1—10. IV.	Sofio	Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj, Instrukomisiono
10.	Siringa Vesperto	23—24. IV.	Loveĉ	E-societo, Loveĉ
11.	Kvalifika seminario por prezidantoj de E-societoj	23—24. IV.	Loveĉ	Organiza Komisiono ĉe CE de BEA
12.	Regiona Junulara Renkontiĝo	7—9. V.	Jambol	E-societo „M. Gorkij“ Jambol
13.	Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo	30. IV.—2. V.	Plovdiv	E-societo „Kulturo“ Plovdiv
14.	Seminario de artagantoj	30. IV.—2. V.	Plovdiv	Sekcio de artagantoj
15.	Pedagogia Konferenco	8. V.	Sofio	Instrukomisiono
16.	Kurso por ekskursgvidantoj-esperantistoj,	9—15. V.	Bankja	Turista Sekcio
16a.	30 jarojn BET	11. V.	Sofio	Bulgara E-Teatro
17.	Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PARE)	14—15. V.	Borovo	E-societo „Lumo“

18.	Renkontiĝo de Virinoj-Esperantistinoj	14—15. V.	Târgoviște	Virina Sekcio
19.	Konferenco de agrarspecialistoj	14—15. V.	Stara Zagora	Sekcio de Agrarspecialistoj
20.	Renkontiĝo de Esperantistoj-matematikistoj kaj specialistoj pri kibernetiko	14—15. V.	Stara Zagora	Sekcio de Matematikistoj
21.	Renkontiĝo de Esperantistoj-Filatelistoj	21—22. V.	Srednogorie	Sekcio de Filatelistoj
22.	Renkontiĝo de Aŭtomobilistoj-esperantistoj	28—29. V.	Pisanica	Sekcio de Aŭtomobilistoj
23.	Renkontiĝo de Vegetaranoj-esperantistoj	28—29. V.	Plovdiv	Sekcio de Vegetaranoj
24.	VIII Internacia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Revolucia Poezio	27—31. V.	Vraca	Komitato pri Kulturo, CK de la Komsomolo, Teatra Altlernejo, Boteva Organiza Komitato, CE de BEA, E-societo „Sukceso“ — Vraca
24a.	Tradicia viktorigo „Esperanto“ kaj turismo“, kun internacia partopreno	27, 28, 29. V.	Razgrad	E-societo „D-ro Zamenhof“, Razgrad
25.	„Astronomia observatorio“ (Poezia recitalo kun internacia partopreno)	2. VI.	Belogradčik	E-societo „Fortikaĵo de la Paco“, Belogradčik
26.	Turistaj E-tagoj kaj festo de montodomo „Esperanto“	9—12. VI.	Sofio	Turista Sekcio
27.	Tilia Vesperto	11—12. VI.	Stara Zagora	E-societo „Asen Zlatarov“
28.	Regiona kunsido de E-instruistoj	26. VI.	Plovdiv	E-societo „Kulturo“, Plovdiv
29.	Seminario de muzikagantoj	20—30. VI.	Pisanica	Sekcio de Artagantoj
30.	Internacia aŭtomarŝo	2—3. VII.	Pleven-Niŝ	E-societo „Edelvejso“, Pleven
31.	Kvalifika Kurso por Instruistoj de Esperanto	10—30. VII.	Sofio	Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj, Instrukomisiono ĉe CE de BEA
32.	Ŝakfestivalo „Târgoviște-88“ (kun internacia partopreno)	15—24. VII.	Târgoviște	E-societo — „Verda Eskadrono“, Târgoviște
33.	IV Danuba E-Renkontiĝo SIERO	22—24. VII.	Insulo „Esperanto“	E-societo „G. Stanev“ Orjaĥovo
34.	VI Internacia Somera E-Universitato	16—22. VII.	Veliko Târnovo	E-societo „Lumo“, Veliko Târnovo
35.	Turista marŝo en Pirin-montaro (kun internacia partopreno)	15—29. VII.	Pirin-montaro	Turista E-societo „Edelvejso“, Pleven
36.	Internaciaj E-kursoj por civitanoj	1—20. VII.	Pisanica	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
37.	Renkontiĝo de Blindaj Esperantistoj	23—24. VII.	Plovdiv	Sekcio de Blinduloj
38.	Internaciaj E-kursoj por lernejoj	27. 7.—9. 8.	Pisanica	Instrukomisiono ĉe CE de BEA

39.	Esperantista Turista Marŝo (kun internacia partopreno)	13—22. VIII.	Pirin-montaro	E-societo „Esperanto Triumfonta“
40.	Internacia Junulara E-la- borbrigado	1—27. VIII.	Pleven	E-societo „Eterna Amikeco“, Pleven
41.	Internacia Danuba Remado — IDR'88	17—31. VIII.	Rivero Danubo	Turista Sekcio
42.	Internacia Junulara E-laborbrigado	1—20. VIII.	Sădievo	E-societo „Nigra Maro“
43.	Internaciaj E-kursoj por Instruistoj	10—30. VIII.	Pisanica	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
44.	E-Seminario por specialistoj pri terminologio (terminologia seminario esperantista)	2—8. IX.	Pisanica	Instrukomisiono TEC
45.	Kunsido de instruistoj de Esperanto en Sofio	13. IX.	Sofio	Instrukomisiono ĉe CE de BEA — Sofio
46.	Seminario-ripozo (kun internacia partopreno) „Tra arbaroj kaj kamparoj“	18—28 IX.	Velingrad	E-societo „St. Kalpazanov“ — Velingrad
47.	Renkontiĝo de poŝtistoj	23—25. IX.	Pisanica	Sekcio de Poŝtistoj
48.	Nacia Turista Marŝo	24—25. IX.	Sliven—Ĵeravna- Kotel	E-societo „Espero“ — Sliven
49.	Tradicia renkontiĝo dediĉita al la 35-jariĝo de MEM	24—25. IX.	Samokov	E-societo „Rila Esperantisto“ — Samokov
50.	Internacia Junulara E-Seminario	26. IX—2. X.	Pisanica	Junulara Sekcio
51.	Rodopa Vespero	2—3. X.	Smoljanski ezera	E-societo „Kulturo“ — Smoljan
52.	Frukta Vespero	8—9. X.	Kjustendil	E-societo „Flamo“
53.	Renkontiĝo de ĵurnalistoj	8—9. X.	Vraca	TEJA
54.	VII Medicina Konferenco	14—15. X.	Bankja	Sekcio de Medicinistoj kaj E-societo „Solidareco“ — Bankja
55.	Internacia Festivalo de kino-foto-agantoj	11—15. X.	Vraca	ILEF, E-societo „Sukceso“ Vraca
56.	Renkontiĝo de fervojistoj	11—12. X.	Velingrad	Sekcio de Fervojistoj
57.	Kaŝtana Vespero	22—23. X.	Petriĉ	E-societo „Esperanto Trium- fonta“ — Petriĉ
58.	Regiona lernejana E-renkontiĝo	29—30. X.	Plovdiv	E-societo „Kulturo“ — Plovdiv
59.	Renkontiĝo kun organizantoj de E-aranĝoj	8—9. X.	Bankja	Turista Sekcio
60.	Kunsido por interŝanĝo de sperto inter la E-societoj	13. X.	Kazanlâk	Organiza Komisiono
61.	Finalo de lingva E-olimpiko	17—18. XII.	Sofio	Instrukomisiono



BULGARIO

IVANIČKA DOBREVA SAVOVA (38-jara) — ul. Jurij Gagarin 39, 5100 Gorna Orjahovica — pri ĉt kun ĉl.
LIDIA MILOSEVA (31-jara, fraŭlino) — ul. Kolarovska 9, 1113 Sofio — pri ĉt kun ĉl. Kolektas BK kaj PM.
DIANA SLAVEVA (18-jara) — 2260 Svoĝe, kv. Drenov, Sofia obl., str. Sredna gora 47, pri ĉt kun ĉl.

SVISLANDO

RETO ROGANTINI (37-jara) — Via Sent 2, 7500 St. Moritz — pri ĉt kun ĉl. Kolektas PM.

RUMANIO

AKOS NAGY — 4193 Ulies, str. Principala Nr. 50 Jud.Harghita — pri rock-muziko kaj interŝanĝo de diskoj kun bulgaroj.

POLLANDO

JERZY SKORZEWSKI (37-jara, juristo), ul. Konińska 10, 62-560 Skulsk, pri ĉt kun ĉl. Kolektas BK kaj PM.

KINGA STRUGALA (13-jara) — Oś.Słoneczne, ul. Jasna 9a/13, 57-200 Labkowie Sl. — pri muziko, literaturo, sporto, turismo kun ĉl.

SOVETUNIO

RIMA SAMARDOKAITE (16-jara) — LJSR 30-ĉio 27-61, 235000 Jonava, Litovio — pri muziko, literaturo kun ĉl.

Sep gejunuloj (19—25-jaraj), deziras kor. kun ĉl pri ĉt. Kumuna adreso: Gintaras Ziaunys, P. O. Box 422, 232004 Vilnius, Lithuania, SU.

VLADIMIR KREMINSKIJ (30-jara) — 281900 — SU Ukrainio, u. Kamenec-Podolskij, ĉefpoŝto, a/k N 3 — pri historio, literaturo, turismo, kun ĉl.

LUNJOVA ELINA (21-jara) — Do vostrebovanija, SU-410054, Saratov-54, pri ĉt kun ĉl.

Grupo de geesperantistoj (13—60-jaraj), dez. kor. pri ĉt kun ĉl.

Komuna adreso: Litovio USSR, 235000 Jonava, a. k. 7, Esperanto-klubo „Tondro“.

- II Triumfo por titanoj (Ljuba Maĝarova)
- 1 La vivo tion postulas de ni! (Sava Dălbokov)
- 2 Unua nacia konferenco pri E-instruado (Veneta Baleva)
- 3 Por nia lingva perfektigo: Diferencigo de la seksoj en Esperanto (Violin Oljanov)
- 4 Originala verkaro: La dua miljaro (Neveta Nedelčeva)
- 5 Juna Esperantisto: Paco, politikumado kaj lojaleco (Maria Jankova)
- 6 Nia intervjuo: Mia frato Trifon... (Czislav kaj Teresa Biedulski)
- 6 Sub hispana ĉielo (Dončo Hitrov)
- 8 Honore al la Oktobra Revolucio
- 9 Premiita poetino
- 10 In memoriam
- 11 Afrikaj esperantistoj venis spertiĝi en Hungario (Péter Sándor)
- 11 Opinio: Por efika instruado (Nikola Nikolov)
- 12 El Sovetunio
- 12 Tra la gazetaro
- 13 Kiam, kie, kion
- 13 Konkurso de Monda Turismo 1988
- 14 Naciaj kaj regionaj aranĝoj kaj aranĝoj kun internacia partopreno de Bulgara Esperantista Asocio dum 1988
- IV Verdaĵ steletoj

Sur la unua kovrilpaĝo: Vintra feliĉo.

NI KONDOLENCAS

Jam ne estas inter ni la forpasinta la 23-an de aŭgusto 1987 en Varna veterano-esperantisto kaj aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo BELČO PAVLOV NIKOLOV.

Li estas naskita en 1900 en urbo Sumen, en familio de laboristoj. Li esperantiĝis dum 1922. Baldaŭ li komencis korespondadon kun fremduloj, gvidis kursojn por komencantoj. Pli malfrue, kiel politika elmigrinto, li prelegis Esperante kaj liaj kamaradoj-esperantistoj helpis al li trovi laboron aŭ loĝejon.

Aktive li partoprenis la preparon de la Septembra Ribelo 1923. Persekutata de la polico, en 1924 li elmigris Francion, kaj poste transiris en Sovetunion.

Dum 1946 li revenis Bulgarian. En Varna li laboris en DK de BKP, estis sekretario de UK kaj DK de BKP, instruanto kaj rektoro en la Supra Ekonomia Instituto.

Pro meritoj al la partio li estas honorita per multaj ordenoj kaj medaloj.

Ni, geesperantistoj-veteranoj kaj pli junaj geesperantistoj el societo „Albatroso“ — Varna, kliniĝas antaŭ lia hela memoro.

Stefan APOSTOLOV

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAGIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MI-TEV, prof. d-ro Kiril POPOV

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ČALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado.

Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

VERDAJ STELETOJ

Araba fabelo

Arabo havis tri filojn. Kiam li estis mortonta, liaj tri filoj kunvenis por aŭdi la lastan volon de sia patro.

— Mi lasas al vi, diris la maljunulo al la filoj, dek sep kamelojn. Dividu la heredaĵon inter vi tiel: la plej aĝa ricevu la duonan, la dua — la trionan kaj la plej juna — la naŭonan parton.

Li diris kaj forpasis. Poste antaŭ la tri filoj starigis nesolvebla tasko — oni povas dividi dek sep nek duone, nek trione, nek naŭone.

Kiom ajn la filoj pensis, ili nenion povis elpensi kaj adresis sin por helpo al saĝulo, preterpasanta ilian domon kamelrajdante.

— Prenu aldone mian kamelon — proponis la saĝulo. Prenis la fratoj lian kamelon kaj kune kun iliaj dek sep la kameloj fariĝis dek ok.

Kaj ili komencis dividi la dek ok kamelojn. La duono el dek ok estas naŭ, la triono — ses, la naŭono — du.


— Kaj nun adiciu la rezultitajn nombrojn, — konsilis la saĝulo.

La filoj dividis dek ok kaj aldonis al naŭ ses kaj poste ankoraŭ du — fariĝis ĝuste dek sep. Kia do miraklo!

— Mi vidas, ke mia kamelo estas superflua, — ekridetis la saĝulo. — Ĉiu el vi eĉ sen ĝi ricevis sian parton de la heredaĵo. testamentita de via patro.

Esperantigis: St. POPOV

KIAL LA FINGROJ DE LA MANO
NE ESTAS TIEL ARANGITAJ?



Desegnaĵo: Pavel RAK
(El „Juna Amiko“, n-ro 4/1987)

Peto al Avo Frosto



Avo Frosto,
peton mi havas,
ne koleru, nur vi
min savos.

Frateto mia, tute eta
sketilojn por ĉi-vintro
petas.

Frato nun ja estas eta
en lulilo.
Mi pli grandas.
Dum li kreskos, ekirados
la sketilojn mi uzadus. . .

Verkis: Ertika Esop
Tradukis: Johannes Palu
Desegnis: Pavel Rak
(El „Juna Amiko“, n-ro 4/1987)

Ĉiuj fingroj estas infanoj de la samaj gepatroj. Iliaj gepatroj lasis ilin hejme kun tre malmulte da manĝaĵo, dum ili foriris al malproksima loko. Kiam la infanoj malsatis, la mezfingro konsilis atendi la gepatrojn, sed la kvara fingro sugestis, ke ili prenui manĝaĵojn de alies farmbieno. La dikfingro kaj la etfingro kontraŭis tion. Sed poste la etfingro cedis, lasante nur la dikfingron kiel oponanton. Tiel, dum ĉiuj aliaj ŝtelis manĝaĵojn, li flankeniris, rifuzante kunlabori kun ili, krom se estis absolute necese. Kiam hejmenvenis la gepatroj, ili kulpigis la aliajn infanojn pri ilia senpacieneco, sed laŭdis la dikfingron kaj donis al li duoblan porcion da manĝaĵo. Pro tio ĝi estas la plej dika kaj plej grava fingro.